SZOCIALISTERMELÉSBŐL FAKAD A JÓLÉT

HUNGARA VIVO

I
1979
11,- Ft

KOMENCU ĈE SKALA!

NI ATENDAS VIN

de la 8-a horo ĝis la 19-a horo en nia sekcio de multspecaj industri–varoj

de la 7-a horo ĝis la 20-a horo en nia nutraĵ–sekcio

SKÁLA

Kliento–servo: 850–850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H–1368
Aperas dumonate
XIX. jaro 1979. Nro 1
(83)

ENHAVO

Benczik, V.: Intervjuo kun János Kádár 2
Fenyvesi, E.: 1919: Hungarlanda Konsilia Respubliko 4
Tóth, Á.: La nova dio (K. *Kalocsay*)
Barna, Z., *Fenyvesi*, E.: Esperanto-movado dum la Konsilia Respubliko 10
Juhász, Gy.: Al fronto de Laboristhejmo (*Fejes*, M.) 11
Fejes, E.: Brasikaĵo 12
Balázs, B.: Apud la fajro, en gardo ruĝa (*Rados*, P.A.) 13
Hernádi, Gy.: Tavoligo kaj disigo (*Benczik*, V.) 14
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 7. (VHZs) 16
László, István: Hungario kaj la naciaj malplimultoj 18
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 20
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
D-ro László, F.: Akvoprovizado de la refreŝiĝejoj en la montaro Mátra – problemo solvita (*Pechán*, A.) 24
Varga, J.: Miniaturoj 32
Fenyvesi, E.: Lingvaj rimarkoj 32
Kapitány, L.: Mondĉampiona konkurado de kvarĉevalaj ĉaristoj 33
Bednarik, A.: Literatura frandaĵo (Ankoraŭfoje pri la reĝedzino) 34
Révész, S.: Ne mi konfuzis 34
Gergely, M.: La bildoj de Endre Bálint 35
Benczik, V.: Esperantaj libroj 36
Benczik, V., *Fenyvesi*, E., *Polišĉuk*, P. *Mihalkov*, G.: Recenzoj 37
Krucenigmo, Leterkesto 39
Korespondi deziras 40

Sur la kovrilpaĝo: Afiŝo, eldonita dum la Konsilia Respubliko

Daŭris nur 133 tagojn...

la Hungarlanda Konsilia Respubliko, sed tiu mallonga tempo sufiĉis, ke ĝi estu engravurita por ĉiam en la memoro de la hungara popolo.

La tempo estis mallonga, sed ne la atingaĵoj malgrandaj. La Konsilia Respubliko forblovis miljarajn mensogojn, miskredojn kaj kompleksojn: evidentiĝis, ke la proletaro kaj aliaj laborulaj tavoloj kapablas regi kaj direkti sian landon, ke la ekspluatado ne estas nepra komponanto de la ekonomia vivo, kaj ke la internaciismo ne signifas patrujperfidon.

Dum tiuj kvar monatoj kaj kelkaj tagoj la proletaro faris grandajn paŝojn en la reorganizado de la ŝtata vivo, kiun distaŭzis la pli ol kvarjara milito, draste likvidis la ekspluatadon, kaj sukcese defendis la landon kontraŭ ekstera atako. Fine povis venki ĝin nur insido kaj superforto eksteraj. Nun, ĉe ĝia 60-a datreveno, kiam ĝiaj celoj triumfas en nia lando dum pli ol tri jardekoj, fiere ni primemoras tiun ĉi oran paĝon de nia nacia historio. Tiun fieron ni volus dividi kun vi per tiu ĉi numero.

Estas kvazaŭ superflue diri, ke dum tiuj ĉi 133 tagoj floris ankaŭ la hungara Esperanto-movado. Ni dediĉas apartan artikolon al tiu ĉi ĉapitro de nia movadhistorio.

Al la temo de la Konsilia Respubliko ligiĝas ankaŭ du noveloj en tiu ĉi numero. Tiu de Endre *Fejes* revokas bildon de unu el la 133 tagoj, dum la verko de Gyula *Hernádi* donas imagon pri la posta blanka teroro. Ni esperas, ke la superrealismaj bildoj de *Tavoligo kaj disiĝo* ne fortimigos niajn legantojn.

Malgraŭ la centra temo, ni klopodis fari tiun ĉi numeron varia. Certe multajn interesos raporto pri kurioza mondĉampionado: tiu de ĉaristoj. Ne ridetu – la konkuroj havis cent mil spektantojn! Alia artikolo eble surprizos tiujn, kiuj supozis Hungarion pure nacia ŝtato: ĝi konigas la vivon de naciaj malplimultoj en nia lando.

Tiun ĉi unuan numeron de nia 19-a jarkolekto fermas pli ol kutime ampleksa recenza rubriko.

La Redakcio ankaŭ en tiu ĉi jaro volonte ricevos kritikojn, sugestojn de ĉiuj niaj legantoj. Ne hezitu do: per via opinio vi helpas nin *redakti tian revuon, kian vi deziras legi!*

Intervjuo kun János Kádár

Depost la jaro 1974, subskribo de la Fina Akto de Helsinki, Hungario faris sian eblon efektivigi la rekomendojn de tiu dokumento. La Fina Akto donas gravan atenton interalie al la plibonigo de kunlaborado inter landoj kun malsama socia sistemo. Nia lando jam antaŭ 1974 faris multe sur tiu kampo, tamen, la intensigo de la kunlaborado ricevis novan elanon post la subskribo de la Fina Akto.

Bone spegulas tion, ke dum la lasta tempo János Kádár, *la unua sekretario de la Centra Komitato de Hungara Socialisma Laborista Partio, membro de la Prezidiumo de Hungara Popolrespubliko faris vizitojn al pluraj kapitalismaj landoj, nome al Aŭstrio, Italio, Federacia Respubliko Germanio kaj Francio. En Romo li renkontiĝis ankaŭ kun papo Paŭlo la 6-a. Antaŭ sia vizito al Francio (aŭtune de 1978) li donis intervjuon al la franca ĵurnalo* Le Monde *(La Mondo). Ĉar tiu intervjuo – krom la hungara-franca kunlaborado – tuŝas interesajn aspektojn de la interna kaj ekstera politiko de Hungario, ni publikigas ĝin en formo iom koncizigita.*

En la pasinto Francio kaj Hungario ofte trovis sin en tendaroj malamikaj. Kiel vi prijuĝas la eblan kunlaboradon en la estonto, post via vizito al Parizo?

Dum la 19-a jarcento Parizo, ĉefurbo de la granda burĝa revolucio ĉiam altiris la atenton de la veraj hungaraj patriotoj. La franca kulturo ĉiam efikis fekundige al la hungara literaturo kaj arto, kaj la hungara popolo neniam rilatis malamike al la franca.

Sed la hungara popolo dum sia historio plurfoje sentis ke ĝi ne ricevis la esperitan helpon de Francio, en sia luktado por la socia progreso kaj nacia sendependiĝo. Kaj sekve de la malvenko de progresemaj fortoj, la reakciaj hungaraj regantaj klasoj ligis nian landon al la imperiisma Germanio en ambaŭ mondmilitoj.

Tamen, la revoko de la pasinto ne multe helpas en la solvo de niaj nunaj problemoj. Mi trovas, ke ekzistas eblo konstrui longtempan bonan amikecon kaj kunlaboradon inter niaj landoj. Ni klopodas, ke – konforme al la spirito de la Fina Akto kaj al niaj komunaj interesoj – vastiĝu la politikaj, ekonomiaj, teknikaj-sciencaj kaj kulturaj kontaktoj inter niaj landoj, intensiĝu la interŝanĝo de informoj, kaj niaj popoloj havu unu pri la alia pli fundajn konojn, ol ĝis nun ili havis.

Dum la lastaj jaroj Francio montris pli da intereso pri nia lando, ĝi faris plurajn bonintencajn paŝojn, kaj ankaŭ ni faris nian eblon inde reciproki tiujn.

János Kádár en Parizo subskribas deklaron kun Giscard d'Éstaing

Ekonomio, konvertebleco kaj krizo

Dum la lastaj jaroj Hungario havis regulan kaj konstantan ekonomian kreskadon. Kiagrade tiu sukceso estas ŝuldebla al la nova ekonomia meĥanismo? Ĉu vi trovas, ke tiu eksperimento estas kondamnita resti specialaĵo de la hungara socialismo, aŭ ĝi povos iĝi ekzemplo, modelo de evoluo por similgrandaj landoj en la socialisma tendaro?

La vere seninterrompa evoluado de la hungara ekonomio ŝuldiĝas unuavice al la ŝtata kaj kooperativa posedo de la produktorimedoj, al la socialisma planekonomio, al la sindona laborado de nia popolo, kaj ne laste al la bazo, kiun ni havas en la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo. Tio estas la esenco de nia ekonomio, kaj tiun esencon servas ankaŭ la nova ekonomia meĥanismo, enkondukita antaŭ dek unu jaroj.

Tiu ĉi nova meĥanismo celas unuavice pli elaste helpi la socialisman planekonomion. Ĝi faris pli harmoniaj

János Kádár la 9-an de junio 1977 estis akceptita de Papo Paŭlo la 6-a en Vatikan-urbo

la centran direktadon kaj la memstarecon de la entreprenoj. Ĝi instigis la kreemon, inventemon. Por konservi tiujn pozitivaĵojn, daŭre ni modernigas nian ekonomidirektadon.

Nia ekonomia politiko evoluis kaj evoluas surbaze de niaj situacio kaj celoj. El tio sekvas, ke la ekonomidirektadon, elformitan laŭ niaj cirkonstancoj, neniam ni rigardis modelo por aliaj landoj.

Unu el la celoj de la nova ekonomia mekanismo estas atingo de pli reala prezosistemo, kiu en konvena momento faciligus transiron al la konvertebleco de via valuto. Ĉu vi ne timas, ke la neeviteblaj prezaltigoj, kiujn sekvigus en via lando tiu ĉi politiko, povos fariĝi fonto de novaj sociaj maljustaĵoj?

La prezosistemo estas grava regulilo de la ekonomia vivo ankaŭ en socialismo. Tiel jam de pluraj jaroj ni strebas por tio, ke la produkto- kaj vendoprezoj pli aŭtentike spegulu la realan valorenhavon, kaj ili helpu fari raciajn decidojn en la ekonomio.

Kiel socialisma lando, ni formos ankaŭ nian politikon de prezoj kaj salajroj konforme al la interesoj de la laborantaj homoj. Ni strebos, ke la salajroj estu proporciaj al la farita laboro, kaj la bona laboro estu pagita pli bone ol ĝis nun. Nun estas, kaj daŭre restos varoj kaj servoj – kelkaj bazaj nutraĵoj, trafiko, infanvestaĵoj, instruado, kulturo – kiujn ni subvencias kaj subvencios, por fari ilin akireblaj por la plej vastaj socitavoloj, plimalpli sendepende de ties enspezoj.

Nia sistemo de prezoj kaj salajroj servas por plialtigi la ekonomian efikecon, kaj ankaŭ por firmigi kaj avoluigi la atingitan vivnivelon.

Post kiom da tempo Hungario povos decidi pri la konvertebligo de sia valuto? Ĉu via lando ĉikampe estas „soleca rajdanto" en la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo? Ĉu la konvertebleco ne sekvigos la riskon, ke la hungara ekonomio pli ol ĝis nun dependos de la krizoj en la kapitalismaj landoj?

Jam en la antaŭa demando lanĉiĝis, ke la konvertebligo de la forinto en konvena momento estas unu el niaj ekonomi-politikaj celoj. Tio estas vero. Sed en la nuna momento la ĉefa demando de la internaciaj ekonomiaj kontaktoj de Hungario ne estas la konvertebligo de la valuto. Dum la pasintaj jaroj ankaŭ sen tio signife vastiĝis niaj ekonomiaj interrilatoj kun la kapitalismaj landoj.

La pluan vastigon malhelpas nuntempe ne la manko de valuta konvertebleco, sed multe pli iuj malalte ‹ difinitaj importkvotoj kaj aliaj limigoj, enkondukitaj de niaj kapitalismaj partneroj kaj de la Komuna Merkato.

Ni decidos pri la konvertebligo de nia valuto nur tiam, kiam ties internaj kaj eksteraj kondiĉoj estos kreitaj. Ankaŭ en tiu ĉi demando ni decidos, kiel unu el la landoj, partoprenantaj en la socialisma ekonomia unuiĝo, la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo. Cetere, tiu ĉi demando nuntempe altiras la atenton de la tuta socialisma ekonomia unuiĝo. Interne de nia ekonomia unuiĝo jam estis faritaj signifaj paŝoj por vastigi kaj simpligi la ĝiron kaj ŝanĝon de la valutoj.

Koncerne la efikon de la krizoj: pro la granda amplekso de nia ekstera komerco, Hungario ne povis esti netuŝita de la ŝanĝoj, okazintaj en la internacia ekonomia vivo; tamen, tute maleblas paroli pri dependeco de la kapitalismaj krizoj. La socialisma planekonomio kaj la primara kunlaborado kun la socialismaj landoj ebligas kontraŭpesi la efikon de la krizoj kaj certigi modestan sed seninterrompan evoluadon de nia ekonomio.

Ĉu vi trovas dezirinda la intensiĝon de la integriĝo interne de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo? Se jes, kiagrade kaj kiel?

Mia respondo estas senrezerve jesa. Tiu ĉi integriĝo ebligas, ke la ŝtatojmembroj plej efike utiligu siajn rimedojn, plurobligante siajn enlandajn eblojn pere de la internacia kunlaborado. En la socialisma ekonomia unuiĝo la tradicia ekstera komerco ĉesas esti dominanta formo: ricevas ĉiam pli gravan rolon la produkta, scienca kaj teknika kunlaboradoj. Ni volas evoluigi ankaŭ la labordividon inter la landoj, la specialiĝon, kaj intensan kunlaboradon en pluraj branĉoj de la ekonomio, kiel ekz. en konstruado de atomcentraloj, en komputado ktp.

Ĉe-Danuba kunlaborado

Kian rolon povas havi la malgrandaj kaj mezgrandaj landoj en Eŭropo post la subskribo de la Fina Akto? Ĉu vi aprobas la intensigon de la kunlaborado inter la ĉe-Danubaj landoj?

La konservo de paco estas intereso de ĉiu popolo, kaj por tio respondecas la registaro de ĉiu lando. La malgrandaj kaj mezgrandaj landoj, ĉiu en sia bloko – se ili apartenas al tio –, en siaj duflankaj interrilatoj kaj en la internaciaj organizoj povas fari multon por vastigi la kunlaboradon inter landoj kun malsama socia sistemo, konforme al la rekomendoj de UN, kaj al la interkonsentoj, kune prilaboritaj en Helsinki.

La Hungara Popolrespubliko, kiel ŝtato-membro de la Kontrakto de Varsovio kaj subskribinto de la Fina Akto, konscias pri sia respondeco, agante ĉu kune kun siaj aliancanoj, ĉu memstare. Ni aprobas la multflankan, por ĉiu lando oportunan kaj reciproke utilan kunlaboradon inter la Eŭropaj landoj. Ni trovas, ke enkadre de la Europaj interrilatoj povas havi apartan gravecon la kunlaborado de la ĉe-Danubaj landoj, ja tiu rivero jam de pluraj jarcentoj kunligas la popolojn, vivantajn apud ĝi.

Ĉu krizo de internaciismo?

Dum la lastaj jaroj vastiĝis la socialisma tendaro. Tamen, paralele estas sperteblala krizo de internaciismo. (Disharmonio inter Sovetio kaj Ĉinio, Vjetnama-Kamboĝa konflikto, problemoj de naciaj malplimultoj ktp.) En kiuj kaŭzoj laŭ vi radikas tiu krizo? Kie vi vidas la eblon de ĝia likvido?

La demando menciis kiel fakton, ke la socialisma tendaro vastiĝis, la familio de la socialismaj landoj dum la lastaj jaroj fariĝis pli granda. Tiu historia fakto pruvas ne la krizon de la internaciismo, sed ĝuste ĝian vivkapablon.

Nuntempe fariĝas ĉiam pli variaj la naciaj medioj, en kiuj disvolviĝas la universalaj leĝoj de la socialisma konstruado, kaj komenciĝas la realiĝo de la socialismaj principoj. La objektivaj kaŭzoj de la nunaj disopinioj laŭ mi kuŝas – interalie – en la tre malalta nivelo de la materialaj kaj kulturaj rilatoj, hereditaj post la antaŭaj regantaj klasoj, kiel ankaŭ en la malsama evolugrado de la socialismo en diversaj landoj. La subjektivaj kaŭzoj estas facile rilatigeblaj kun la restaĵoj de la burĝaj principoj revivigantaj de tempo al tempo – egoismo, nacia miopeco, rasaj antaŭjuĝoj, burĝa naciismo ktp. – ankoraŭ troveblaj en la vivo de la nova socio.

La hungara popolo post 1945 komencis konstrui la socialismon en lando subevoluinta ankaŭ el kapitalisma vidpunkto, plena de feŭdismaj rudimentaĵoj. Ni bone konis la gigantecon de la malfacilaĵoj, la eblon de eraroj, kaj ankaŭ la damaĝojn, kaŭzitajn de la eraroj. Ni trapasis tiujn malfacilaĵojn, kaj ni atribuas tion al la forto de niaj ideoj kaj sistemo, kaj al la persisto de nia popolo.



János Kádár en Bonn kun kanceliero Schmidt

Diskutoj inter komunistoj

Kiel vi opinias pri iuj kritikoj de certaj okcidentaj komunismaj partioj, adresitaj al certaj socialismaj landoj? Ĉu vi trovas, ke tiuj disopinioj povos esti ordigitaj en nova konferenco de la Eŭropaj komunismaj partioj?

Inter la komunismaj partioj estis, estas kaj estos diskutoj. La diskutoj ĉiam estis akompanantoj de la preskaŭ unu kaj duona jarcenta evoluo de nia movado. Tute ne estas mirinde, ke niaj politikaj kontraŭuloj klopodas trotaksi tiujn disopiniojn, kaj surbaze de tiuj semi malkonkordon inter la komunismaj partioj de socialismaj landoj, respektive inter tiuj de kapitalismaj landoj. Sed tiuj niaj kontraŭuloj kalkulas malbone: en la komunisma movado la sameco de la bazaj interesoj kaj celoj estas pli granda forto, ol tio, kio de tempo al tempo naskas disopiniojn inter la partioj.

Koncerne la kritikojn de kelkaj okcidentaj komunismaj partioj pri la praktiko de la socialisma konstruado, mi povas paroli nur pri la hungara sinteno. Ni tute ne volas idealigi nian laboron kaj la situacion de nia lando. Ni konscias, ke la socialismo estas evoluanta sociformo, en kiu fariĝas ĉiam pli fortaj la trajtoj, karakterizaj por la nova socio, sed troveblas, kelkfoje eĉ fortiĝas fenomenoj nesocialismaj. Ni scias, ke la konstruado de la socialismo estas tasko por longa tempo. Al la socialismo ne kondukas vojo pavimita; pro tio foje-foje sekvas haltoj, misvojiĝoj kaj malfacilaĵoj, sekvantaj el subjektivaj eraroj. En nia kazo tio ne bezonas detalajn klarigojn.

La Hungara Socialisma Laborista Partio havas enordajn, normalajn interrilatojn kun senescepte ĉiuj komunismaj partioj de Okcidenta Eŭropo, kaj ni estas solidaraj kun iliaj bataloj. Dum niaj intertraktoj ĉiam reciproke ni diras unu al la alia niajn opiniojn, kiuj kompreneble ne ĉiam estas la samaj. Sed ankaŭ en tiaj momentoj ni petas niajn kamaradojn, ke ili ekkonu pli funde la realajn cirkonstancojn de la socialismaj landoj, ili konsideru, ke ankaŭ ni havis nian propran historian vojon, kaj ili ne volu trovi en nia nuna socia realaĵo tiun vojon, kiun ili volos iri, konforme al la propraĵoj – diferencantaj disde la niaj – de la historia evoluo de sia lando. Ni ĉiam supozas bonan intencon ĉe niaj frataj partioj en Okcidenta Eŭropo, kaj tial ĉiam serioze ni konsideras iliajn rimarkojn.

Mi estas konvinkita, ke la disopinioj inter la komunismaj partioj malpliiĝos, ili estos elimineblaj; tion povos akceli ĉefe la pli oftaj renkontiĝoj, la sistemaj du- kaj plurflankaj intertraktoj. Se okazos nova konferenco de la Eŭropaj komunismaj partioj, tie la tagordo konsistus unuavice el temoj, kiuj akcelas eblajn kaj necesajn komunajn agadojn, per kiuj la komunismaj partioj povas kontribui al la malstreĉiĝo kaj la socia progreso en nia kontinento.

Koncizigis kaj tradukis V. B.

1919: Hungarlanda Konsilia Respubliko

Ervin Fenyvesi

La 23-an de marto 1919 antaŭ la Parlamentejo centmiloj aklamis la proklamon de la Konsilia Respubliko

La revolucio komenciĝis aŭtune de 1918.[1] Hungario sendependigis sin de la Habsburga Monarkio, formiĝis respubliko kaj koalicia registaro, ĉekape kun grafo Mihály *Károlyi*,[2] elstara kontraŭmilita politikisto. Dum tiu postmilita periodo venkis ankaŭ la naci-liberigantaj revolucioj ene de la Monarkio, tiu de la ĉeĥoj kaj slovakoj, de la kroatoj kaj slovenoj. Sendependigis sin ankaŭ aliaj nacioj de la Monarkio: rumanoj en Transilvanio, serboj kaj poloj, aliformiĝis eĉ la restinta German-Aŭstrio, detroniginta la imperiestron.

Tra la kontinento furoris informoj venintaj el la iama cara imperio, kaj antaŭ la multe suferintaj homamasoj leviĝis optimismaj horizontoj: en tiu vastega lando oni distribuis la bienojn, ĉu kredeble? Eĉ pli! Laboristoj iĝis mastroj de fabrikoj!? „Revenantaj militkaptitoj pravigas la dubindajn ĵurnal-telegramojn!" – skribis Viena gazeto, kaj oni avide kaptis la fean revon pri *Mondrevolucio*. Neniel senbaza revo, ja de ĉiu direkto alvenis insistoj, fajreroj lanĉiĝis ĉie, la torento ŝajnis kapti la mondon en reala proksimeco.

Dum la kvinmonata burĝa fazo de la hungara revolucio daŭre kreskis la impeta politika tajdo: misfamaj ŝtatoficistoj estis multloke forpelitaj; mizeranta kampularo senpacience distribuis grandbienojn; minejoj, fabrikoj estis jam foje eksproprietigitaj far laboristoj. Por haltigi tiun fluon, registaraj trupoj ne hezitis mortigi centojn. La revolucia registaro gardis ja la ordon de la posedo, samtial klopodis senigi la konsiliojn kaj aliajn popol-organizojn disde la vera politika-ŝtata influo. La reakciaj fortoj, eksaj militpolitikistoj, ŝovinismaj oficiroj jam organizis sin malkaŝe kontraŭ la revolucio, sed tiun ĉi minacon la Hungarlandaj *„ĝirondistoj"*, la registaro klopodis reĵeti nur inerte. Kaj kulmine de la misoj: la vivgravaj bezonoj de la popolo – kiu tiom multe atendis de la revolucio – restis en la promesoj, sed fakte ne plenumiĝis. Ni aldonu: ververe ili ne estis plenumeblaj flanke de la burĝaro.

Jen la ĉefaj motivoj, kiuj klarigas, kial la plua disvolvo iris iom analoge la vojon de la grandaj revolucioj en Francio kaj Ruslando. La modernaj „jakobenoj", la komunistoj estis nun tiuj, kiuj direktis la revolucion al la neevitebla sekva fazo. La freŝe kreita komunisma partio, ĉekape kun Béla *Kun* kaj alĭaj malnovaj socialistoj, ĉirkaŭite de eminentaj radikaluloj, verkistoj kaj scienculoj, inĝenieroj kaj artistoj, decide, kun apenaŭ imagebla fervorego ekagis laŭ la Leninaj instruoj. En vere *internacia etoso* la KP kunigis proletojn de la naciaj malplimultoj, elpaŝis kontraŭ ŝovinismo por krei novan socion en Mez-Eŭropo.

La ĉefa celo estis: formi regadon de laboristoj kaj kamparanoj, t.e. „diktaturon de proletaro" por venki la kapitalistojn, la (tro fortan) aristokratan grandbienularon. Nur tiel estas eble ĉesigi la ekspluatadon de la laboruloj. Tiu programo enhavis do la postulojn likvidi la atavismon de feŭdismo, transdoni la grandbienojn al la kamparanoj, kaj nuligi la egan politikan influon de la katolika eklezio (cetere plej granda bienposedanto de la lando). En Francio oni apartigis jam antaŭ pli ol jarcento ĭa ŝtaton disde la eklezio – la malfruo de Hungario karakterize aludas al la ĉi tieaj cirkonstancoj.

Same realisme estis konsiderite – helpe de ekonomiistoj, poste mondfamaj scienculoj –, ke en Hungario la kapitalistoj estis plenumintaj jam sian pozitivan historian rolon, kreinte modernan industrion. Ties progreso jam ne bezonas la posedantojn, eĉ malpli akciulojn; la necesaj organizkapablo kaj fakscio kontentige troviĝas ĉe la intelektaj kaj fizikaj laboruloj. Tiun tezon – por la revolucio fundamentan – poste plene pravigis la kapitalisma stagnado dum la kvaronjarcenta Horthy-regado, aliflanke la saltmaniera socialisma progreso en la ekonomio post la dua mondmilito.

La monumento de la Konsilia Respubliko

Surprize rapida estis la disvastiĝo de la revolucia movado de la KP: mitingoj kaj amaskunvenoj, gazetoj kaj personaj kontaktoj kvazaŭ inunde igis aliĝi al la komunisma partio multe da konsilioj de laboristoj, de soldatoj, de gravegaj fabrikoj; baldaŭ tutaj social-demokratiaj organizaĵoj, kazernoj, eĉ sindikatoj deklaris sin komunistaj revoluciuloj. La lukto inter la popolo kaj la riĉhavaj klasoj senhalte *kreskis:* printempe de 1919 jam ŝajnis klara, ke la politika plejforto staras malantaŭ la partio, strebanta *pluvolvi la revolucion.* La konflikto staris jam ĉe la sojlo . . .

El malliberejo al la registaro

La revolucion haltigi strebanta koalicia registaro kvazaŭ imitis la manovron de la *Kerenskij*-registaro: oni arestigis la tutan estraron de la komunisma partio. Sensukcese: aliaj daŭrigis la agadon. Pli da mitingoj, pli da homoj postulis liberigon de la gvidantaro. Béla Kun kaj liaj kunuloj post monato tagojn antaŭ la planita atako de la fidela popolo — *abrupte liberiĝis kiel . . . ŝtatgvidantoj.* La reĝimo kolapsis pro neatendita skuiĝo!

En fokuso de zorgoj de l' entento tiutempe estis la bolŝevika revolucio en Ruslando. La *Pariza Konferenco* multe planis por sufoki ĝin: oni haste preparis militirojn de pluraj ŝtatoj por *interveni* favore al la „blanka" kontraŭrevolucio. Burĝaj regklasoj de najbarlandoj volonte akceptis rolon, precipe en planoj de la Franclanda imperiismo.



Georgo Lukács, poste mondfama estetikisto kaj filozofo estis popolkomisaro pri publika instruado

De tie fluis abunde armiloj kaj mono, staboficiroj kaj diplomatiaj promesoj, subtenoj; tiu alianco kontraŭ la revoluciaj movadoj firmigis la internan pozicion de la ĉeĥoslovakia, rumana, sudslava burĝaro, sed aliflanke izolis la revolucian Hungarion. La reĝimo de Károlyi — malgraŭ lia malnova ententamikeco — nek politikan, nek materialan helpon akiris de l' entento: grandaj esperoj vaniĝis! Unu post la alia iĝis pli striktaj la provizoraj (demarkaciaj) limoj de la lando, laŭ postuloj de l' entento (por cedi al la soifo de la najbarlandaj burĝaroj, sed ankaŭ pro militpreparoj de la reĝa Rumanio kontraŭ Ruslando, por havigi al ĝi tiucele fervojliniojn). La lasta postulo ŝajnis jam malebligi la ekziston de la lando (tn. „noto de Vix"). Rifuzante ties plenumon, la registaro kaj mem prezidento Károlyi *abdikis,* deklarante publike, ke la *sola elirvojo estas la regado de la laboruloj.* La burĝa revolucio komplete fiaskis . . .

Regadon transpreni la socialdemokrata partio *sola jam ne* kapablis, tial ĝia estraro haste turnis sin al la alia laborista partio: ĝiaj delegitoj devis la saman tagon — *en la malliberejo — interkonsenti* kun la estraro de la komunisma partio:

- la du partioj unuiĝas, surbaze de komunisma programo,
- la konsilioj de la popolo prenas la regadon en formo de proletardiktaturo kontraŭ la ekspluatantoj kaj la imperiismo,
- oni proklamos la Konsilian Respublikon.

Naskiĝas nova ordo — 21 marto 1919

La centraj konsilioj de laboristoj, de soldatoj per ega ovacio akceptis tuj la interkonsenton, la proklamon de la unua popola potenco en Hungarlando. Grandioza manifestacio antaŭ la parlamento aklamis solene, centmiloj tie kaj alie, tra la lando. La nova potenco transprenis sian lokon pace, sensange; la kuraĝo kontraŭi la entent-imperiismon, solvi la internajn problemojn, akiris esperplenan subtenon de la lando.

La lokaj konsilioj prenis la potencon ĉie, direktis fervore la aferojn de la vilaĝoj ĝis la baldaŭ elektita (per sekreta voĉdonado, neniam tiel vasta) supera Landa Ensemblo de Laboristo-, Soldato- kaj Kampulo-Konsilioj. La laboristoj atingis sian celon: la *uzinoj* iĝis ŝtata propraĵo. Sekvis alŝtatigo de la bankoj, magazenoj, apotekoj, grandaj loĝdomoj. La farmoj malpli grandaj ol 50 hektaroj restis privataj, sed sur la *grandbienoj* fondiĝis kooperativoj de kampuloj. Ofte la antaŭa posedanto estis komisiita per la direktado, apud kontrola konsilio. Forta antaŭenpaŝo estis tiam la 8-hora labortago, altigo de salajroj, kaj ankaŭ tiurilate egalrajtigo de virinoj, la reduktado de la loĝeja lupago.

La Hungara Konsilia Respubliko tenis kontakton kun Soveta Ruslando. Hungara popolkomisaro Tibor Szamuely (parolanta) kun Lenin sur la Ruĝa Placo en Moskvo (MT)

Jam la burĝa revolucio luktis por alŝtatigi kaj modernigi la plimulton de la *lernejoj*, ĉar ili apartenis al la eklezioj; la Konsilia Respubliko solve finis tiun longtempan problemon, celante enkonduki modernajn, demokratiajn pedagogiajn metodojn, i.a. la devigan okjaran senpagan bazlernejon. Protekti la infanojn estis speciala zorgo de la proletar-diktaturo.

En artaj aferoj disvolviĝis multfaceta, vigla vivo, la novaj impulsoj profunde tuŝis ja la spiritojn. Nur kelkaj famkonataj nomoj estu menciitaj, entuziasme aliĝintaj „al la ruĝa, pli bela kaj bona mondo de la justeco", laŭ emfazo de poeto Gyula *Juhász*. Apud la granda estetikisto kaj filozofo Georgo *Lukács*, popolkomisaro de kulturo, ariĝis poetoj, verkistoj: Mihály *Babits*, Béla *Balázs*, Gyula *Krúdy*,[3] Zsigmond *Móricz*,[4] Árpád *Tóth*; grandaj muzikistoj: Béla *Bartók*, Zoltán *Kodály* kaj multaj aliaj. Teatro-biletoj tre malkare estis disdonitaj pere de sindikatoj al la *nova publiko* por ĝui teatraĵojn de Strindberg, Shakespeare, Maeterlinck, Shaw, Gorkij k.a.

Interveno de l' entento

La ententon surprizis la nova revolucio: izoli ĉi tiun, samkiel Sovet-Ruslandon de la komenciĝantaj Eŭropaj revolucioj ŝajnis nepre necese. La rumana reĝa armeo jam meze de aprilo komencis la atakon al rivero Tisza, sed la atendita rezulto estis io alia, kion ni legu el tiamaj raportaĵoj de ĵurnaloj:

Slovaka Konsilia Respubliko estis proklamita la 16-an de junio en Eperjes (Prešov)

Ĉu ni defendu Budapeŝton?

Defendi la proletan potencon, aŭ memvole allasi ĝin al la burĝaro por klasregado kun ekspluato kaj subpremo: jen la temo de la hieraŭa kunsido de la ĉefurba Laborista- kaj Soldata Konsilio en la Urbodomo.

La Kvincento respondis inde al la historia tempo. Unuanima estis la rezolucio: *defendi ĝislaste* la hungaran Konsilian Respublikon kaj la internacian proletan revolucion! . . .

. . . La hieraŭan rezolucion de la Laborista Konsilio matene, en la fabrikoj, la laboristoj aŭskultis kun ega entuziasmo. Oni aklamis marŝi tuj al la batalfronto por defendi la landon. Hastaj mitingoj per solenaj decidoj aliĝis al la rezolucio de la Laborista Konsilio, postulante armilojn batali por la proleta revolucio. Kvankam komisaroj proponis soldatiĝon nur al la jam ekzercitaj 18 – 45 jaruloj, tamen la fabrikoj decidis, ke ĝis la 50a jaraĝo senescepte ĉiu soldatiĝos.

. . . En la fabriko Teudloff oni kriadis, ke senbezone jam paroladi, ili volas ekagi, kaj *tuj marŝis* al la kazerno. En la granda norda riparejo de la fervojoj, el la tri mil laboruloj 1800 tuj laŭregule trupiĝis, kaj ekmarŝis al la kazernoj, kie ili ricevis uniformojn kaj armilojn. El inter la oficistoj de la fabrikoj, kiuj grandparte estas rezervoficiroj, multaj kunmarŝis al la kazernoj . . . La entuziasmo estas nepriskribebla. Al la fronto marŝos multaj laboristaj konsilioj, ankaŭ la ĉefurba centra Laborista Konsilio ekiros kun la proleta armeo de Budapeŝto.

(Vörös Újság, 4 majo 1919)

Alarma informo

venis la unuan de majo, ke la ĉeĥaj trupoj okupis la najbaran vilaĝon kaj proksimiĝas al urbo Salgótarján. Tagmeze ceŝis la laboro en la minejoj de Salgótarján. Nur kelkaj necesaj prizorgantoj restis en ili, ĉiuj aliaj prenis armilon, kiel ili tiumomente estis, nigre, malpure de la karbo – kaj rapide formis batallinion norde de la urbo, atendante la malamikon. El Salgótarján alvenis same armita laboristaro de la ŝtalfabriko, de la vitrofabriko, de la Hirsch-fabriko.

Dum tuta semajno ili defendis la urbon. Fine alvenis la 6. divizio, kiu forpelis la ĉeĥojn trans Fülek (nun Fil' akovo en Ĉeĥoslovakio), kaj en Salgótarján estis eble denove eklabori. Duono de la laboristaro ankoraŭ servas perarmile, la ceteraj laboras en la minejoj . . .

En defendo de la Konsilia Respubliko partoprenis ne nur hungaroj. Grupo de aŭstraj ruĝarmeanoj



Rumanaj reĝaj trupoj en Budapeŝto

La delegito de la minista sindikato, kiu nun direktas en la urbo la karboproduktadon, informas: post unusemajna batalo, la 8-an de majo ekfunkciis la minejoj de la urbo. Poste ankaŭ la ceteraj reokupitaj minejoj de la norda regiono... Oni jam sukcese atingis, ke ĉiutage 4–500 vagonoj da karbo estas liverataj al Budapeŝto...

(Vörös Újság, 18 majo 1919)

Skizan superrigardon pri tiuj eventoj ni prenu rekte el la inaŭgura parolado de Béla *Kun,* prononcita en la unua Landa Asembleo de la Konsilioj (14. junio 1919):

... La Hungarlandan proletaron, kiu levis la ruĝan standardon de la internacia revolucio, nun minacas la imperiismo. Hungarlando situas inter predon sopirantaj etaj ŝtatoj – ĉiamaniere subtenataj de la venkaj imperiismaj grandpotencoj – kaj tial la hungara popolo havis nenian alian eblecon, ol armile repuŝi la ekspluatemon de ĉiuj banditoj. La kapitalisman jugon forĵetinta hungara proletaro montris la ĝustan vojon kiel solvi la postmilitajn problemojn, kaj tio evidente altiris la koleregon de ĉiuj imperiistoj. Ili sencese strebas faligi, neniigi la Konsilian Respublikon, kiu minacas ilian profiton...

Subaĉetoj, preparo de kontraŭrevoluciaj ribeloj, organizo de blankaj terorgvardioj – al kiu ni neniel respondas per ruĝa teroro –, ĉia rimedo konvenas al ili por atingi sian celon. Samtempe atakis nian respublikon milittrupoj, estritaj de francaj kaj italaj oficiroj, kaj tiuj neniam neis, ke ilia celo ne estas nura okupado, sed unuavice la restarigo de la eksa reĝimo, de la kapitalisma ekspluatado. Sed la laboristaro tuj komprenis, ke per tiu milito oni volas neniigi la internacian socialismon. Kelkaj tagoj sufiĉis por mobilizi el inter laboristoj novan, disciplinitan armeon.

Tiu armeo repuŝis la rumanojn tra la rivero *Tisza*... La grandiozaj venkoj konsternis kaj terurigis en *Versajlo* la ĉefojn de la internacia kontraŭrevolucio. Tiu nesto de la reakcio malkaŝe preparas la neniigon de la juna Hungarlanda Konsilia Respubliko...

Venkoj kaj malvenko

En nia artikolo pri Aurél *Stromfeld,* generalo de la hungara Ruĝa Armeo,[5] estis mallonge skizita la landon kaj revolucion defendanta milito. Tiam estis proklamita ankaŭ la *Slovaka Konsilia-Respubliko,* sed *tiun en Bavario* la reakcio jam distretis. Havis signifan gravecon la persista kontraŭstaro de la hungara proletaro por la sindefendo de Ruslando, en ĝia longdaŭra militado kontraŭ la atakoj de l' entent-armeoj. Fine Soveta Ruslando purigis sian teron disde la intervenantaj malamikoj, sed domaĝe, la sola ekstera socialisma armeo, la hungara, tiam estis jam delonge venkita de la burĝaj armeoj, ankaŭ helpe de ruza insido, de ĉirkaŭantaj konspiradoj. La reĝa rumana armeo okupis la ĉefurbon, la centron de la lando, je grandega ĝojo de la aristokratoj, de la riĉa burĝaro. Post 133 tago ekregis la terura kontraŭrevolucio.

La Eŭropa faŝismo komenciĝis jen en ties tendaro; helpe de okcidentaj burĝaj ŝtatoj, kiuj akceptis, toleris, eĉ subtenis la sangan teroron de admiralo

Kaj furoris la blanka teroro... Dénes Bibó, ĉefleŭtenanto de terorgvardio pendigas komunistojn en vilaĝo Tab

Horthy, timante lin malpli, ol ili timegis la socialisman revolucion. Post dudek jaroj Eŭropo konatiĝis deproksime, sur propra tero, kun la sangavida faŝismo. La historio argumentis por tiuj klarviduloj, kiuj volis definitive forĵeti arkaiĝintan ŝovinismon, socian maljustecon, ĉiamajn fontojn de novaj ŝtormaj konfliktoj: post 25 jaroj la hungara popolo rekomencis vivi en ŝtato de laboruloj.

1. Vd. pri la „antaŭhistorio" de la Konsilia Respubliko en nro 1978/5.
2. Vd. eseon pri Mihály Károlyi en nro 1975/3.
3. Vd. nron 1978/4.
4. La nro 1979/3 estos dediĉita al lia verkaro.
5. Vd. biografion pri Aurel Stromfeld en nro 1978/3.

Árpád Tóth

La nova dio

Nun nova dio venas al vi, homoj!

Ne tra incenso naĝa en obskuraj
haloj albrilas liaj fajr-okuloj
el ora kadro de ikonoj brunaj,
li nek inter altarkandeloj blankas
kun alabastra mut' indiferenta,
statu' trivita de kredulaj kisoj,
ne ĉielul' enue sorbadanta
siropajn ondojn de tirataj, longaj
litanioj.
Ho ne!
Jen dio nova!
Nun nova dio vokas al vi homoj!

Ne la ĉiel' lin naskis, ne ĉiele
li vivas, fore nekonat' mistera,
kovranta vangojn per la firmamento,
kiel per friska blua silktalaro,
ne!
Sed li nek idolo tera estas,
Ne tiu Mamnon, kiu grasorgojle
sursidis nin, dum el la buŝ' serpentis
miliono da antenoj parazitaj,
kaj tiuj sorbaj suĉaj brakoj vringis
virginajn korpojn, rompis por la fajna
medol' sonorajn kapojn rompis por la fajna
medol' sonorajn kapojn de l' poetoj,
kaj penetrante tra l' profundaj blindaj
fabrikaj fumotuboj, ili glitis
en mornon de la sklavlaboraj haloj
por trinki ĉiun larmon kaj malbenon.

Kaj ĉio ĉi en la pigra Monstro iĝis
or' kaj malsato nova, kvankam ŝtopis
l' intestojn plenajn jam la peza oro,
kaj sur la putra granda korp' aperis
timigaj oraj kadavromakuloj.

Nun nova dio venis al vi, homoj!

La sango de la sanga ter' lin naskis:
la multa, densa, amara sang' elflua
koaguliĝis tra l' doloraj kampoj,
kunglue ekkorpis, je figur' turiĝis,
figur' grandega, nuda, sangkolora,
kiu landpaŝe-vaste piedsvingas
kaj kies voĉ' eĥigas por ektremo
la Teron, sonorante el la ruĝa
Oriento al la pala Okcidento:
„Jen venis mi!
La ruĝa dio venis!"
Li marŝas, kaj de l' tondraj paŝoj tremas,
la blonda Sejno bordojn transverŝante,
Jerike eĥas la Westminster olda,

Árpád Tóth

sur verda vitro de la Oceano
antaŭentremas ruĝe lia ombro
mil mejlojn longa, kaj ĝi ĉirkaŭkaptas
la blindan muron de la Blanka Domo.

Hosana al vi, nova di', hosana!

Ekkonu nin, la viaj estas ni!
La kara viva suk' en vi movanta
la koron, ĉi triumfa ruĝa pulso
ankaŭ el nia trista sang' riĉiĝis,
kaj en la trenon de trombono via,
mond-alarmanta, glitas ja modeste,
sed tamen helpe, ankaŭ la tremanta
voĉo de nia torturita gorĝo:
orfa hungara riveret' de veoj,
en ĉien-muĝan Moskvan riveregon,
kiu la mondon lavos pura nun.

Hosana al vi, nova di', hosana!

Voĉ' via estu nova verb' de kreo,
planedon nian kotan, kulpan, oldan,
fuŝitan de malnovaj sinjor-dioj,
vi, inter dioj nova kaj proleta,
formu feliĉa peř la man' martela
nin prenu sur titanajn viajn polmojn,
transknedu nin laŭ via propra bildo.
(1919)

Tr.: K. *Kalocsay*

Esperanto-movado dum la Konsilia Respubliko

La florado de la hungara Esperanto-movado dum la burĝa revolucio en 1918/19 memkompreneble daŭris, eĉ pliiĝis post la venka tago, la 21-a de marto 1919, kiam la laboruloj sensange transprenis la potencon en Hungario. Libere funkciis la esperantistaj organizoj, la plejparte intelektula HES, la laborista HESL, ankaŭ la Propaganda Komitato de IL, tiu sukcesa tendaro de aŭtoritathavaj simpatiantoj. Inter la novaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis konvene la roloj ene de la movado.

La laborista socieo apartenis dekomence al laborista partio, kaj nun al la reganta unuiĝinta laborista partio. HESL farigis do ligilo inter la tuta movado kaj la ŝtataj organoj. Membroj de HESL, komunistaj esperantistoj plenumis gravajn oficojn en la ŝtato, en la partio, kaj ili fervore utiligis siajn eblojn por helpi la movadon en la plivastiĝinta horizonto de la Konsilia Respubliko.

La membroj de HES gvidis lingvokursojn, instruis, kaj direktis la propagandon, precipe pere de la Propaganda Komitato de IL. Ni klarigu nun almenaŭ skize la novajn bazojn de tiuj agadsferoj. La nova respubliko *kreis grandiozan planon por instruado* de la popolo, por levi alten la kulturnivelon, konsiderante la egajn mankojn, kiujn postlasis la antaŭrevoluciaj reĝaj registaroj. La ampleksa kleriga plano – tiutempe la plej demokratia kaj progresema en Eŭropo – entuziasmigis la intelektularon de Hungario. Por efektivigi ĝin alviciĝis eĉ tiaj progresemaj intelektuloj, kiuj idee akceptis la proletan ideologion de la Konsilia Respubliko.

Laŭ tiu plano la tuta publika instruado estis transformita. Anstataŭ la kvar-klasaj, oni organizis 8-klasajn bazlernejojn – senpagajn kaj devigajn. Laŭ la nova *mezlerneja* instruprogramo la gimnazianoj devis lerni du fremdlingvojn, kaj inter la elekteblaj lingvoj estis ankaŭ Esperanto! Unuafoje en Hungario estis Esperanto oficiale egalrajtigita per tio, kaj permesita ĝia lerneja instruado.

Tiu ĉi verko, aperinta unuafoje en 1931, nun estas reeldonita de Hungara Esperanto-Asocio

Jam en marto fondiĝis la Socieo de Esperanto-instruistoj, kaj baldaŭ komenciĝis instruado de Eo en 12 mezlernejoj de Budapeŝto. La kostojn, la honorarion pagis la Komisariato de Publika Instruado (ministerio), samtiel por la miloj da afiŝoj, kiuj propagandis la IL-on. Por la *plenaĝuloj* oni organizis tn. „liberajn lernejojn" senpagajn, tie oni instruis ankaŭ Esperanton, precipe en la ĉefurbo. Estis kreitaj apartaj lernejoj *por la junaj laboristoj* pri fakaj kaj ĝeneralaj konoj, kaj inter tiuj estis instruita ankaŭ Esperanto. Dum majo jam fondiĝis E-grupo de Junlaboristoj en ejo de HESL.

Estas inde mencii la multajn lingvokursojn tiutempe, eĉ en la laborejoj, i.a. en la Fremdultrafika Oficejo, ĉe fervojistoj kaj poŝtistoj, ĉe la Ruĝa Gvardio (polico). Tie ĉi 200 ruĝgvardianoj partoprenis la kursojn, kiujn gvidis lerta propagandisto, oficiro Ágoston *Marich,* post sukcesa artikolserio en la gazeto de la Ruĝgvardio. La jam menciita Pál *Robicsek,* nun komisaro de la poŝto, apogis la aferon per pluraj dekretoj; i.a. li fondis Eo–Fakon en la instrua sekcio de la poŝto, en kies Budapeŝta centro lernis baldaŭ ducent poŝtoficistoj la IL-on. Nature, ankaŭ la esperantistoj en provinco, precipe en industriaj urboj ekviglis, kaj en la publika informado, kaj per kursoorganizado: dum tiu revolucia printempo okazis preskaŭ 40 kursoj en la lando! Oni vendis komence de la jaro pli ol *tri mil* lernolibrojn, almenaŭ mil personoj konatiĝis do kun la IL dum la 133 tagoj de la Konsilia Respubliko. Inter la militaj cirkonstancoj, ege ĝenantaj la tiaman vivon, la disvastigo de IL atingis seriozajn rezultojn; ties fruktoj prezentis sin dum la posta, peza kontraŭrevolucia epoko.

En la ĉefurbo la centro de la movada vivo fokusiĝis en la bela nova klubejo de HESL (en eksa burĝa palaco sur avenuo Üllői). Prelegoj, prezentadoj sekvis unu la alian tie ĉi; en la montaro de Buda komunaj ekskursoj kunligis la verdan familion. En la granda demonstrado je la 1-a de Majo la esperantistoj kune marŝis sub la verda standardo. Unu monaton poste, okaze de datreveno de la Unua Libro preskaŭ ducent esperantistoj solenis ĉe la amfiteatro-ruinoj de *Aquincum* kaj kantis en ĥoro Esperantlingve la Internacion, tradukitan por tiu okazo de *Kalocsay.*

Ankaŭ la Propaganda Komitato funkciis sukcese. Ĝia honora prezidanto estis la jam menciita Rudolf *Rajczy,* populara ŝtata funkciulo, fervora esperantisto. Oni aperigis la grandformatan gazeton HUNGARA REVUO por informi la mondon pri vivo de la Konsilia Respubliko. Ĝis somero 5 numeroj iris eksterlanden, senmaskigi la kalumniojn de la malamika burĝa



Rudolfo Rajczy, altranga fervoja oficisto, estis ankaŭ rimarkinda originala poeto

Propaganda afiŝo eldonita dum la Konsilia Respubliko

gazetaro pri la proleta ŝtato (bedaŭrinde restis en Hungario nur unu ekzemplero da ili). La Komitato – per helpo de la Komisariato de Internaj Aferoj – dissendis tiun revuon al 12 landoj, precipe al redaktoroj de laboristaj gazetoj kun la peto, traduki kaj publiki la artikolojn. La Komitato tradukigis kaj dissendis al eksterlando ankaŭ aliajn tekstojn. En tiu serio aperis la libreto de Béla *Kun:* „Kion volas la komunistoj? ", kiun esperantigis Paŭlo *Balkányi.* Telegramoj kaj leteroj de alilandaj sindikatoj, laboristaj partioj kaj E-grupoj venintaj kvazaŭ responde al tiu agado, esprimis solidarecon kun la Hungarlandaj esperantistoj kaj laboruloj.

Eble la pinto de la enlanda propagando de la Komitato estis la Dua Esperanto-Tago en urbo *Győr* (djőr) fine de aprilo, kie ĉeestis centoj da esperantistoj el la tuta lando. La libera evoluo de la E-movado, kvankam forte subtenata de la proleta potenco, kaj malgraŭ la vastaj sukcesoj atingitaj, ne povis daŭrigi sian venkan vojon. Mallonga la tempo, malpaca la ĉirkaŭanta mondo, tiuj estis kontraŭaj al la Konsilia Respubliko, kiu devis sin armile defendi. Batalante kontraŭ la eksterlandaj atakoj la hungara revolucio falis, ĉesis por longa tempo ties progresemaj aspiroj, aŭ nur inter mizeraj cirkonstancoj kaj grandegaj malfacilaĵoj oni devis por ili plu barakti.

La kultura sinteno de la Konsilia Respubliko, ĝia amika rilato al Esperanto igis simpatiantoj ankaŭ la ne-socialistajn esperantistojn. Post la malvenko, kiam la kontraŭrevolucia gazetaro strebis ĉiamaniere malhonorigi la proletan ŝtaton, niaj E-gazetoj eĉ unu atakan vorton ne skribis, sed male, objektive menciis la tiamajn rezultojn de IL.

La malvenkon sekvanta „blanka" teroro prenis viktimojn ankaŭ el inter la esperantistoj. Post mortigo de Rudolf *Rajczy,* la Hungara Esperantisto kuraĝis publiki nekrologon, verkitan de religiema esperantisto: „. . . lia sorto estis tiu de la martiroj . . . kiuj . . . volis efektivigi la homamon, pacon, kulturprogreson por la homaro, kaj kiujn la skeptika mondo repuŝis, kaj la amaso krucumis." (HE 1920. febr.).

La pastro kaj deputito Sándor *Giesswein,* gvidanto de HES, eĉ pli akre esprimis sin en la parlamento, protestante kontraŭ la blanka teroro, kiu „je nomo de la kristana nacia renaskiĝo murdis amase komunistojn, sindikatanojn, laboristojn kaj kamparanojn."

Nek teroro, nek misfamigo povis forgesigi inter esperantistoj la Konsilian Respublikon, kiel epokon de altaj sukcesoj por nia movado.

Zoltán *Barna* – Ervin *Fenyvesi*

Gyula Juhász:

Al fronto de Laboristhejmo

Vi, enpaŝanto, trafas katedralon,
ja sanktaj estas kreo kaj la fort',
levantaj ĉiam al ĉiel' homaron,
donontaj savon al venonta sort'.
Por vivo nia formas principaron
triop': laboro, paco kaj la ord'.
Senpatriaj fihomoj estas solaj,
la parazite vivantoj izolaj!

Vi, enpaŝanto, paŝas en futuron,
kiu alportos kontraŭ ŝvit' kaj sang'
al milionoj rajton kaj plezuron,
ke estu ĉiuj feliĉaj sen mank'!
Kiel la Sun' prilumas la naturon,
ekbrilu hele ĉiu homa vang'!
Labor ne estu por ni devo nura,
sed himno por la aro laborula!

Vi, enpaŝanto, venu kun espero,
ĝi estu por ni gvida ruĝa flag',
kaj elirantoj dissemu sur Tero
la fortan kredon pri triumfa ag'!
Labori ek, sen laco, sen ŝancelo
dum vivo lumas, ĝis la lasta tag'!
Deklaru: tie prosper' en futuro
estas nur por kreanto, laborulo!

1919. Tr.: Márton Fejes

Novaĵo!

Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio

Endre Fejes:

BRASIKAĴO

(Fragmento el la novelo „Pariza rememoro"

„

Apenaŭ tagiĝis ankoraŭ, ĉe angulo de la strato Képíró la virinoj jam faris longan voston. Ili metis siajn malplenajn korbojn al la bazalta pavimento de la trotuaro, kaj babilis por pasigi la tempon. La bakejo estis fermita. Virino kun tuko surkape fanfaronis: ŝian fileton oni veturigis al sanatorio.

– Kaj vin ne, ĉu? – demandis apudstaranta virino. – Vi do iom tro furioze tusadas.

– Ankaŭ min oni veturigos – respondis la kaptukulino. – Oni ja promesis. Nur malmultas la sanatorioj. Kaj ni tusadas multaj.

La virinoj kapjesadis.

Teksistino rakontis pri sia fianĉo.

– Belulo li estas – ŝi diris –, li havas larĝajn ŝultrojn. Lia hararo nigras kiel la fulgo.

– Kion vi parolaĉas? – ridis ŝia najbarino. – Li estas kalva kvazaŭ kukurbo!

Ĉiuj ridis.

– Pro la tifo – eksplikadis konfuzite la teksistino. – Sed liaj okuloj estas la antaŭaj. Ili ja nigras.

– Kiam vi geedziĝos? – interesiĝis pli aĝa virino.

– Nun li estas foririnta al la Ruĝa Armeo – respondis la knabino. – Se la rumanoj estos forbatitaj, li revenos. Tiam ni konstruos domon. Mia frato ja estas masonisto kaj li ĉarpentisto.

La virinoj stampfetis, babiladis.

Iom poste viro kun biciklo haltis ĉe la rando de la trotuaro. Li ekfumis cigaredon.

– En la Sovetdomo* oni drinkas ĉampanon – li diris amare –, kaj vi faras voston por unu kilogramo da glua pano.

Tion dirinte li tuj forbiciklis.

La virinoj eksilentis. La teksistino diris: mensogo.

Poste ili frapis pordon de la bakejo.

– Hej, kamarado!! – ili kriadis. – Kio okazos kun la pano?

La bakisto respondis, ke pano malestas. Oni ne ricevis farunon, do oni ne bakis ĝin. Eble posttagmeze . . .

La virinoj blasfemadis. Kaj poste ili iris al la apuda strato. Ankaŭ tie atendadis longa vico.

La bakisto donadis la panojn.

– Ne estas plu! – diris li bedaŭre. – Ni ricevis malmulte da faruno.

Li malsuprenigis la ŝutron.

La virinoj ekzumis.

– En la Sovetdomo oni drinkaĉas ĉampanon – diris la kaptukhava tuberkulozulino. – Kaj ni malsatadas! Bone diris la biciklulo

Maldikulino abrupte kaplevis.

– Li estis ankaŭ ĉi tie! – ŝi kriis. – Ili banas siajn inaĉojn! Ili havas bordelon! Kaj miaj geidoj ploras por pano!

La teksistino silentigadis la aliajn:

– Posttagmeze oni donos panon. Ĉiu ĝin ricevos.

– Prolo** nenion ricevas! – kverelis pordistino. – Nur fusilkuglon! Ĉiam nur fusilkuglon. Ankaŭ via fianĉo ĝin ricevos! Kaj en la Sovetdomo la putinoj manĝas kukon!

Blinda kolero kaptis la virinojn. Ili estis eble tricentope.

– Ni iru al la Sovetdomo! – ili kriadis. – Ni kraĉu al iliaj okuloj.

Ili ekiris tra la urbo ekscitantaj unu la alian. La virinoj atendantaj antaŭ la vendejoj aliĝis al la grupo demonstracianta.

La Sovetdomo situis ĉe la Danub-bordo.

Multmilopa aro de virinoj venis al la pordo kvazaŭ malpacema torento. Ili svingis la pugnojn al la ĉielo. La ĉirkaŭaĵo bruis pro ilia sovaĝa kolero.

La gardantoj senpove gapis ilin.

La gvidantoj komprenis el la terura uragano de voĉoj: la virinoj estas ribeligitaj. Ili ekprovis konvinki ilin, paroli kun ili, sed ĉio vanis. Oni fermis la pordon, ĉar la virinoj atakis ĝin. La gvidantoj ne volis uzi perfortajn rimedojn.

La bruado aŭdiĝis ankaŭ tra la mallevitaj kurtenoj en la kabineto de la popolkomisaro pri militaferoj. Li fermis la mapon sur sia skribotablo kaj foriris al la koridoro.

– Kio okazas? – li demandis.

– Nenio, kamarado Fiedler – respondis oficiro. – Ne zorgu pri tio. Prefere provu ripozi almenaŭ unu horon. Vi ja ne dormas jam la kvaran tagon.

La popolkomisaro levis sian sendorman, lacan rigardon al la oficiro.

– Kial venis ĉi tien la virinoj? – li demandis.

– Oni ribeligis ilin – la oficiro respondis. – Oni diris al ili, ke la popolkomisaroj vivas sate kaj glate. Sed ili laciĝos. Ili kriados dum certa tempo kaj poste rehejmiĝos. Nun ni havas pli da zorgoj.

La popolkomisaro pri militaferoj ekiris al la ŝtuparo. Tie li ankoraŭ returniĝis:

– Nenio pli gravas ol ilia konfido.

Li sola eliris la pordon. La virinoj eksilentis. Li havis enmane teleron kun brasikaĵo kaj ĵetis ĝin teren. Al iliaj piedoj.

– Jen! Tio estas mia tagmanĝo.

– Vi mensogas! – kriis unu el la virinoj. – Ĉe vi en la poto kuiriĝas kokino!

La virinoj komencis damnadi.

– Sufiĉas! – kriis Fiedler. Lia vizaĝo ruĝis pro la emocio. – Elektu komisionon, ili rigardu la kuirejon.

Li reiris la pordon akompanata de dek virinoj.

La kuiristo miris pri la neatenditaj gastoj.

– Kion vi kuiris? – demandis la komisaro.

– Krispan brasikon – respondis la kuiristo.

– Montru ĝin al la virinoj – diris Fiedler.

En la kaseroloj vaste, flave bolis la kuiraĵo. La virinoj konfuze ĝin rigardis.

La teksistino gustumis ĝin.

– Kanajlo! – atakis ŝi la kuiriston. – Se vi kuiras jam



nur brasikon, faru tion almenaŭ honeste!

La virinoj vituperis la kuiriston kaj forpelis lin disde la kaseroloj. Ili salis, spicis la manĝaĵon.

– Venu al ni por vespermanĝi, kamarado Fiedler – diris unu el la virinoj. – Mi pretigos frititajn pork-piedojn.

– Tiam la loĝantoj de la Sovetdomo ekkolerus – ridis Fiedler. – Ili eĉ dirus, ke la komisaro pri militaferoj havas apartan manĝon.

Li aldonis mallaŭte:

– Ankaŭ mia edzino manĝas brasikaĵon. Ankaŭ mia filineto neniam plendas.

Ili kune iris sur la ŝtuparo kondukanta el la kelo.

Vesperiĝis. Sur Danubo alvenis svelta monitoro. Malantaŭ ĝi elegante naĝis la dua. La tria. Antaŭ la Sovetdomo ili ekfajris.***

Super la teksistino estingiĝis la lampo. La malplena kadro balanciĝis grincante.

Sed ŝi tion ne jam aŭdis.

La oficiroj alportis flagon. Fiedler kovris sangan bluzon de la knabino. Naŭ virinoj foriris tra la pordo.

– Ili manĝas brasikaĵon – diris unu el ili. – Ankaŭ por ili estas malfacile . . .

La virino kun kaptuko tusetis.

– La knabino volis domon – ŝi diris. – Ŝia fianĉo estas ĉarpentisto . . . Li batalas kontraŭ la rumanoj . . .

La virinoj senvorte levis siajn korbojn.

Ili ekiris hejmen.

El la hungara: P. *Rados*

* Tiel la publika lingvouzo nomis la sidejon de la popolkomisaroj.

** *Prolo* – proleto (vulgare).

*** En junio junaj oficiroj de la militista akademio ribelis kontraŭ la Konsilia Respubliko. Pruvas certan naivecon kaj nepran bonvolon de la popola potenco, ke la plimulton de la partoprenintoj de tiu ribelo oni „punis" per tio, ke verkisto E. Sinkó laŭtlegis por ili ĉapitrojn el Dostojevskij-romano, provante konvinki ilin per tio pri la malĝusteco de ilia ago.

Béla Balázs *

Apud la fajro, en gardo ruĝa

Apud la fajro – ĉu estis vero? –
dum militiro sub la ĉielo
en gardo ruĝa mi sur la tero
kuŝis multfoje.
Kapo sursele, mano surfere,
sed mia vido sur brila stelo.

Ni la armilojn kaj vundojn flegis,
pro la kolero la larmoj sekis,
multajn amikojn ni vane vekis
en gardo ruĝa.
Tamen kantado, ŝerco, fabelo
pri la vivbelo inter ni regis.

Li jam decidis. Li sorton vidas.
Li eble mortos. Pri viv' avidas
aŭdi nun, kiu ĉi tie sidas
apud la fajro.
„Kial ni sangas, se ne por belo?
Kantu, poeto! Roso ja fridas."

Rave mi ravas kontraŭforgese,
eĉ sange, kote, plore necese
savi prihoman sonĝon kormeze
en gardo ruĝa.
Ĝemon promesan, ĉarmon homkoran,
mi la vivdolĉon gardu senĉese.

Sen ili vanus ja militiri,
eĉ rabe, kaŝe, sed vivas ili.
Veron fabelo devas babili
apud la fajro.
Belo ekzistas, kie – egalas,
kanten sopiro povas ĝin tiri.

Kion vi donas por ni, poeto?
Estu panuje nutranta kredo,
sonĝo kugluje laŭ via peto
en gardo ruĝa.
Por ami kion ni porbatalas,
do ne senpaga nia mort-preto.

Apud la fajro – jen estas vero –
en gardo ruĝa, kanto pri belo
sonas nun. Kanti tion sur Tero
devas poeto.
Kapo sursele, mano surfere,
sed mia vido sur brila stelo.

El la hungara: P. *Rados*

* Li estas konata por esperantistoj laŭ sia fabelo „La sep reĝidoj" eldonita esperantlingve

Gyula Hernádi*

Tavoligo kaj disigo

Protokolo

(Majo de 1919)

„Kamarado László Tóth raportas, ke la laboristoj de la plugilfabriko resendis la ledajn antaŭtukojn, asignitajn al ili, ĉar tiuj estas faritaj el materialo taŭga por fabrikado de ŝuoj. Ili petas malpli bonkvalitan ledon, eble ŝafan, kiu tute taŭgas pro tiu ĉi celo.

La prezidanto esprimas dankon en la nomo de la konsilantaro por tiu ĉi atentema ago, kaj li promesas, ke oni klopodos akiri laŭ la propono ŝafan ledon por antaŭtukoj."

Ero

(Aŭgusto de 1919)

Aŭroro, trenreto, altebenaĵo, ŝipodoro, al friskaj ŝrankoj moviĝanta, lante alvenanta muro.

Montetoj, severaj latoj, boatforma insulo, leone dika lago.

En piedpostsignoj de ŝiritaj, rigide paŝantaj birdoj aperas akvo, ĝi forspegulas ĉion de sur si, kun senintenca diligento atingas ĝis la pintoj de la misdesegnitaj fingroj, ekiras, el unu sablokolora stelo transaperas en la alian, kun senfina cirkulado.

Konturoj de baskulputo. Paŝtistoj ĝin trenas post si per longa ŝnuro, kaj sub la buĉitaj ŝafidoj ekbrulas la malgrandigita bildo de la puto.

Ĉiu movo estas la tria mateno de la lago. La vento blovas la kanaron supren, ĝi elpaŝas sur la bordon, atakas la ŝtonojn, sin klinas sur tiujn, kaj ili ne plu estas, la ŝtonoj fariĝas forfrotitaj, inflamintaj membranoj.

La montetoj proksimiĝas kaj malproksimiĝas kvazaŭ per balancilo.

Biblio Transdanubia.[1]

Meze de la lago la kanaro reokupas siajn cirkle situantajn poziciojn.

La sanktigitaj, fendetoplenaj kalkanoj de Jesuo je naĝmovo disde la sabla bordo.

Petegaj movoj de la kanaro. Tavoligita, dua vidaĵo. En la infinitezima sfero de la signifo estas revolvataj per metalo kaj humilo la akraj folioj, la nutraĵo, la salikfloro, la senarbejoj de batalpaŭzo.

Sur la montetoj staras preĝejoj, elastaj, iliajn turojn konstante forportas, reportas la vesperiĝo, la aŭroro, apud ili senmove naĝas la sonorilegoj.

La sedimento povas esti forportita de neniu, belbela ŝarĝo, etaj sablomontetoj sin akvumas en tiuj mankhavaj flakoj.

Brikamasoj, ludkuboj, anstataŭ abismo, kvazaŭ eblus eviti striktajn formaciojn, kvazaŭ la objektoj povus fari provojn per sia senpersona bastoneto, en la ne-elpelebla ĝardeno, kie la fruktarboj nearbe ŝvebas, plenigas la malagrabla-kolorajn kestojn, kie la senatentaj bestoj faligas sian vunditan vilaron kaj foriras ĝis la nutrotrogoj, kie la amhistorioj estas ne-revivigeblaj, kie mankas naĝigataj ĉevaloj, hundoj, kie faras provojn nur la objektoj, kaj tiam fariĝas kontroleblaj, mezureblaj la malaj lokoj, la colaj stacioj, malpura sinsekvado de la ĉiutagoj.

Malplena ĉaro funde de la veturilejo. Malsekiĝintaj pajlo kaj kovriloj, la loko de la ĉevaloj estas seka; paŝadas samloke, interpuŝadas desegnaĵoj, kovritaj per ŝtonruboj, balaaĵo.

La cedemaj proporcioj de la tago sedimentas ĝis la tero, ĉio estas glita fajro.

Kvin fenestroj de la fermentanta kvartiro. Elpuŝita, distranĉita ferpordo, apogita al la muro, malplena lada barelo kuŝas sub la tria fenestro.

Apud la domo ŝovelita teramaso, ĉe ĝia malsupro iks-pieda tablo, ĝiaj sufokitaj kurboj ne rimarkeblas.

Meze de la veturilejo, sin apoganta al la domo, ligitaj al lignokolono staras du selitaj brunaj ĉevaloj. Atente ili rigardas unu la alian. Singardaj pelgalopoj, ŝanĝitaj stalpordoj, betonstangoj, pajlopreĝejoj altiĝas ĉiam pli kaj pli, la ĉevalaj rigardoj sekvus ilin, sed elĉerpiĝis la spronoj, la fanfaroj.

La ĉevaloj bedaŭras. Sur iliaj retinoj rektiĝas la kunfalditaj eskaloj, husaroj venas supren, disetendas siajn brakojn, sur iliaj ruĝaj pantalonoj oraj mirteloj, ilian vaporantan kamizolon sekigadas okulo de Dio, ĉie baŭmas helbluaj, broditaj anĝeloj, en iliaj okuloj pluaj anĝeloj, laŭlonge de la neteneblaj koridoroj, sur ilia kolo pendas furaĝsaketo, ili klinas sian kapon sub korbojn, ridas, en ĉiuj speguloj de la koridoroj grizaj ĉevaloj skuas sian homan vizaĝon, eltiras el la lumo la restaĵon de la silko, henas, forĵetas de si la rajdrimenojn, foriras, revenas.

La akvosurfaco disvastiĝas, nuda knabino kondukas blankan ĉevalon en la lago. Ŝi kondukas ĝin preter la kanaro, tenante malstrikte la bridon.

Silente ili ŝovas la akvon, iras al la bordo.

Senatentaj krioj de la nuda virina korpo. Lombardigita, glata teksto, defendata de kirasaj supersignoj, ŝiaj kunpremitaj aperturoj estas malproksime, ŝian vaginon ĉirkaŭfermas per siaj ekscitaj korpoj, enmasonas la regulaj movoj. Ŝi paŝadas en la akvo malrapide, la ĉevalo obee ŝin sekvas. Ili atingas la plaĝon.

La kanaro etendas sin post ilin, sur ĝiaj ordigitaj, mallarĝaj teritorioj are staras birdoj.

Bariero, farita el longaj traboj, enbatita en la herbo-kovritan teron. Ligitaj al la bariero, staras du brunaj kaj unu griza ĉevalo, seligitaj. La nuda knabino ligas la sian apud la grizan. En la herbo kuŝas longa, ornamita kavaleria glavo, apud ĝi virinaj vestaĵoj. La knabino paŝas al siaj vestoj, kliniĝas, levas la ĉemizon, surprenas ĝin.

Sidiĝas sur la tero, levas de apud si blankan viŝtukon, komencas malrapide viŝi la piedojn. Apud ŝi sidas knabino, vestita per leda kitelo, per la fingroj tenas herbon.

Goya: Saturno manĝas siajn filojn

La knabino viŝas sin malrapideme, per multaj movoj, kiel iu kiu havas tempon nur ĉar en aŭgusto de 1919 ŝi havas multan tempon.

Sur la bruna kepo de la ledkitele vestita knabino ekfajras la oblikviĝinta kvinpinta stelo.

Rilato de la spaco kaj de la horizontalaj trianguloj. Ĉio fariĝas ekskluziva, la insulo komencas kreski, kuras kontraŭ la muron, la vastiĝantaj pesiloj deklinas siajn pezilojn, vomas pro la ekscititeco. Per armilo oni pafis la ornamaĵojn, la sango kaj akvo malrapide forfluas el la centro, el la emoj, el la lasta triono de la sufero, el la arbaro de malriĉuloj, en kiu mankas panarboj, estas nur rifuĝantoj, en kiu mankas forordonita milda sudo, sudokcidento, estas nur neĝodora spiro, en kiu mankas eĉ arbaro, estas nur erarigaj marŝoj, sin premantaj al mapo.

La ledkitele vestita knabino ekstaras, butonumas sian pistolujon, levas de sur la tero la ornamitan glavon, fiksas ĝin al la zonrimeno, sidas sur la grizan ĉevalon, ekirigas ĝin per sola delikata movo de sia boto.

Longbarba, magra ruĝarmeano galopas direkte al ŝi sur bruna ĉevalo. Ili renkontiĝas kaj senvorte pretergalopas unu la alian.

Malantaŭ la kangarboj ŝafoj kuradas tien-reen, poste ili trankviliĝas, mallevas la kapon. La grego estas blanka, senmova kovrilo, sed kvazaŭ blankaj ŝafoj sin movus sub ĝi. Tri maljunaj paŝtistoj staras antaŭ la grego, sin apogante per bastono, rigardante la akvon.

Metodologio

(Oktobro de 1919)

„Oni devas elhaki cent pecojn el la korpo de la mortkondamnitaj komunistoj, tiamaniere, ke ili ne perdu la konscion. Por atingi tion pleje gravas teni sendifektaj la dolorperceptan cerbon kaj la koron, kiu provizas oksigenon al la cerbo. Oni devas lavi kaj ligi ilin tute nudaj al kolono, por vidi bone la tutan surfacon de la korpo. La kolono ne estu pli alta ol necesas por tio, ke ili povu apogi al ĝi sian kapon. Tio gravas, ĉar la kolo en rekta pozicio lasas pli da sango en la kapon, fiksitan al la trabo. Oni efektivigu la alligon firme, per fortika ŝnuro, tamen ne malhelpante liberan trapason de la sango. La iloj, per kiuj oni plenumas la verdikton estu zorge elektitaj kaj seninfektigitaj. Povas esti konsiderataj segilo, hakilo, tranĉilo, tenajlo, ĉizilo, pinĉilo. La interveno ne estu tro abrupta: al doloro iom post iom kreskante la organismo alkutimiĝas sen sveno. Plej oportune estas komenci la manovron ĉe la membroj, pli precize ĉe la mandorsoj kaj pieddorsoj. La sinsekva forpinĉo de la fingroj okazu laŭeble per tenajlo; la malpliigo aŭ la ĉesigo de la sangado estas simpla procedo: oni verŝu sur la nudan vundon densan solvaĵon, faritan el ĉie trovebla kuracherbo, kaj la efikkomponanto de la herbo dum sekundoj kuntiras la angiojn, kaj tiel la sangoperdo estas minimuma. Rutina ekzekutisto plenumas la forhakon de la cent pecoj dum horo, kaj la morto alvenos nur inter la okdeka kaj okdek kvina minuto, kalkulante ekde la unua manovro. Post la fortranĉo de la membroj kaj ĉesigo de la sangado estas necese fari paŭzon kaj paroligi la mortkondamniton. Oni demandu lin, ĉu li sentas doloron en la kruroj kaj brakoj? Ĉiam venas respondo, tio, ke li ne sentas doloron. La parolo estas grava, tial oni ne elŝiru la langon: la parolo rezultigas persiston, kaj ebligas teni la kontakton. Post la paŭzo sekvu la trunko: forigo de la maldekstra parto de la torako, kaj fine la elstaraĵoj de la kapo, la oreloj kaj la nazo. Laste sekvas la okuloj. Ĝis la fino de la sesdeka minuto el la ducent ses ostoj restas en la kondamnito okdek kvin, kaj post la elpiko de la okuloj li vivas ankoraŭ dum dudek-dudek kvin minutoj. Jen la ĝisnuna plej rezultplena sinsekvo de la forigo de ostoj: falangoj de la maldekstra mano, metakarpo[2] de la maldekstra mano, metakarpo de la dekstra mano, la humeroj, tibioj, fibuloj, femuraloj ktp. La mano, la pojno, ulno, radiuso de la maldekstra mano, la humeroj, tibioj, fibuloj, femuraloj ktp. La pluan detalan sinsekvon vidu en la multobligitaj „Instrukcioj pri Detektivado kaj Ekzekutado" de la Politika Detektiva Grupo ĉe la Ĉefestrejo."

Tradukis: *Vilmos Benczik*

*Gyula *Hernádi* (pron. djula hernadi) estas scenariisto de preskaŭ ĉiuj filmoj de la fama hungara filmreĝisoro Miklós Jancsó. Krom tio, dum la lasta jardeko li fariĝis ankaŭ unu el la plej elstaraj figuroj de la moderna hungara prozo. En tiu ĉi novelo, precipe en ĝia dua parto, bone rekoneblas parencaj trajtoj kun la fflmarto de M. Jancsó.

[1] Transdanubio: la tuta hungara teritorio okcidente de Danubo.

[2] Metakarpo: la kvin ĉefaj ostoj de la mano, kies daŭrigoj estas la fingroj.



ĉapitroj el la historio

Zoltán Halász

7. Provo kaj krizo de la centrismo.

La scenejo de la granda triumfo en julio de 1456: Nándorfehérvár (nun Beogrado) (Gravuraĵo el la 16-a jarcento)

Profilo de reĝo Matiaso

Portreto de Johano Hunyadi (mortinta en 1456)

La unua hungara libro presita en la presejo de Andreo Hess, en Buda: Cronica Hungaro rum (1475)



pollens,pudicus fidelis:&p etate prudẽs: cepitq regere uiuẽte
adhuc Iohanne gubernatore. Postea cũ esset in bohemia:obiit
prage anno etatis & coronationis sue decimooctauo:sepultusq
ibidem in ecclesia kathedrali: Anno domini millesimoquadrin
gentesimoquinquagesimoseptimo.

De coronatione regis Mathie.

Post mortem Ladislai regis electus est in regem hungarie
Mathias fe.me.filius Illustris Iohis de hunyad ppe. co-
bustricien Anno dñi millesimoquadringẽtesimoquinquagesimo
octauo:q tam exterris ut bohemis & polonis:q nõnullis incolis
sacre coroe subiectis sibi plurimũ iludatibus ut hro fortissimus:
inuictissimusq restitit Hic etia cũ uahdislimo exercitu regnũ
bozne ingressus caltrum munitissimũ Jayeza noie e manibus
turcoz gloriose eripuit:deinde uictor redtens ad hungariam:
dyademate sancti regis Stephani qđ apud Fridericũ romanoz
imperatoẽ habebat: in ciuitate alberegalis potitus est. ¶ Postea
uero collecto ingẽti exercitu moldauiam terram:principia sacre
coroe subiectam sed p id temporis rebellem ingressus est.ibiq
habito acerbissimo conflictu triũphũ preclarũ atq memorabile
obtinuit. Vnde & uexilla pluria inclyte victorie sue signa budã
usq adduxit.que magna cũ celebritate in prochuli beatissime
Marie uirginis ecclesia affixa hodie conspiciunt. Reliqua aũt
preclara ac memorabilia facinora ferẽtissimi atq inuictissimi dñi
nostri regis:quia tanta sunt q breuiter cõprehẽdi nequeunt:in
aliud tempus differenda:ac latius prosequenda erunt. Pro quo
dño nostro illustrissimo atq gratiosissimo optimus maximusq deus
etiam atq etiam rogandus est:ut eum in pace tranqlla: victorie
obtentatione:fiorum dilectione regni incremento:& diuturna
demũ uite incolumitate tenere.seruare:& augere dignetur.

Finita Bude Anno dñi M.CCCC.LXXIII
in uigilia pentbecostes: per Andreã Hess

Post morto de Ulászló la 1-a, estis elektita kiel reĝo Ladislao la 5-a (1444–1457), kiu tiutempe sin trovis en prizono de Frederiko la 3-a. Tial en foresto de la monarko oni elektis Johanon Hunyadi regento. Militante kontraŭ la turkoj, li suferis malvenkon en la batalo ĉe Rigómező, kio malfortigis lian politikan influon. Tial li abdikis pri la regenteco, kiam en 1452 Frederiko liberigis Ladislon la 5-an.

Dume la internacia situacio ĉiam pligraviĝis, pro fortiĝo de la turka minaco. En 1455 la turkoj okupis la urbon Konstantinopolo, kaj la sekvan jaron entreprenis decidan atakon kontraŭ Nándorfehérvár (nun Beogrado). La turkoj planis, konkerinte ĉi tiun urbon, komenci la subjugon de la tuta Hungario. Pro tiu grava danĝero, la reĝo nomumis Hunyadi ĉefo de la armeo. Per kruelaj bataloj Hunyadi sukcesis rompi la blokadon ĉirkaŭ Nándorfehérvár, kaj la sultana armeo devis retiriĝi. Sekve de tiu ĉi signifa batalo, dum duonjarcento Hungario liberiĝis de similaj amasaj atakoj de la turkoj. Antaŭ la decida atako la papo, Kalisto la 3-a ordonis, ke tagmeze muĝu la sonorilegoj, por voki la defendantojn de la fortikaĵo al preĝado. De tiam, la tagmeza aŭdigo de sonorilegoj okazas memore al la triumfo de Hunyadi.

Post la morto de Johano Hunyadi, la barona ligo Garai-Cillei intencis faligi la potencon de la Hunyadi-adeptoj. La ligo gajnis al si la reĝan apogon, kaj konvinkis Ladislaon la 5-an, ke surbaze de falsaj akuzoj li ekzekutigu Ladislaon, la pli aĝan el la du filoj de Johano Hunyadi. Farinte tion, en la lando tiom streĉiĝis la politika situacio, ke la reĝo devis fuĝi. Li kunportis en Pragon Matiason, la pli junan Hunyadi-filon kiel hostaĝon. En la ĉeĥa ĉefurbo Ladislao la 5-a subite mortis. Premitaj de la meza nobelaro, la urba burĝaro kaj la Hunyadi-adeptaro, la nobeloj elektis por la trono Matiason Hunyadi (1458–1490).

Matiaso, okupante la tronon, estis ankoraŭ adoleskulo, tamen li tre energie kaj per saĝa politiko fundamentis sian potencon. Pere de diversaj ordonoj li kreis monarkion karakterizatan de absoluta reĝa potenco; li organizis modernan reĝan armeon el solduloj; kaj garantiis la komercan kaj industrian evoluon, pere de la firma centra potenco kaj la reformo de la justico. Lia rezidejo, Buda, fariĝis unu el la kulturaj centroj de l' humanismo, kaj li favoris en Hungario la renesancan kulturon. La Buda-an palacon li kompletigis per renesanc-stila alo por doni lokon al la Korvina Biblioteko; en 1473, en la reĝa rezidejo laboris jam presejo.

Prosperis ankaŭ la scienca kaj arta vivo. En urbo Pozsony (nun Bratislava en Ĉeĥoslovakio) ekagis la Istropolitana Akademio; en la reĝa kortego restadis la historiisto Antonio Bonfini, kaj Galeotto Marzio, la fama itala humanisto, kiun Matiaso liberigis el la Venecia karcero de l' inkvizitoroj; la fortikaĵoj de Buda kaj Visegrád estis ornamitaj per majstrajoj de Benedetto de Maiano, Verocchio, Leonardo kaj aliaj.

de la hungara popolo

La katastrofo ĉe Mohács



Parto de la palaco de Matiaso, en Visegrád

Sed la kultura vivo ne koncentriĝis nur en la reĝa kortego, dise en la lando kreiĝis sennombraj kulturaj centroj. Janus Pannonius, episkopo de urbo Pécs kaj fama humanista poeto en sia epoko, posedis bibliotekon kun centoj da volumoj. La urbo Nagyvárad (nun Oradea en Rumanio) fariĝis tiom grava scienca centro, ke la fama tiuepoka astronomo, Regiomontano, en sia verko titolita Tabula Varadiensis, difinis la lokon de la meridiano tra tiu ĉi urbo.

Komence de sia regado, Matiaso militis kontraŭ la turkoj, en 1463 okupis la fortikaĵon de Jajca, sed poste li devis komenci defensivon en la suda regiono. Alie, li sekvis ekspansian politikon rilate okcidenton. En 1485 li konkeris Vienon kaj translokis tien sian rezidejon. Ĉi tie li mortis, subite, en 1490.

La mortinta reĝo lasis post si prosperantan landon, troviĝantan en la avantgardo de la Eŭropa evoluo. Sed post finiĝo de la internaj koliziadoj por la trono, la nobelaj ordenoj elektis en la persono de Ulászló la 2-a (1490–1516) feblamanan monarkon. Dum la grupiĝoj de la eta nobelaro, baronoj kaj la eklezio koliziadis inter si por atingi politikajn kaj praktikajn privilegiojn, la centra povo detruiĝis kaj la lando droniĝis en anarkion. Sub tiuj kondiĉoj estis publikita en 1514 la papa buleo, kiu proklamis krucan militiron kontraŭ la turkoj kaj alvokis la servutulajn amasojn por sin armi. La regantaj feŭdaj klasoj ektimis la armitajn kampularajn amasojn kaj prokrastis la krucan militiron. Sekve, la movado tuj fariĝis kontraŭ feŭdisma. Georgo Dózsa, estro de la servutula armeo, kiu en la antaŭaj, kontraŭturkaj bataloj sin distingis kiel kavaleria oficiro, la armeon kondukis kontraŭ la supremantaj sinjoroj. Granda parto de la orienta Hungario apogis la servutulan armeon; sed post la triumfoj de la komenco, la servutuloj, formintaj blokadon ĉirkaŭ la urbo Temesvár (nun Timişoara en Rumanio), estis disbatitaj de la nobelaj trupoj, pli spertaj en la manipulado de armeoj. La malvenkon sekvis sangaj revenĝoj: Georgo Dózsa estis sidigita sur varmegan feran tronon, lia kapo ĉirkaŭata per inkandeska krono, kaj tiel li estis bruligite viva. Oni ekzekutis milojn da kampuloj kaj fine, en la nacia asembleo, aranĝita aŭtune de 1514, estis kodigita la porĉiama subpremado de la servutuloj.

Post tiuj okazintaĵoj, dum la reĝado de Ludoviko la 2-a (1516–1526), filo de Ulászló la 2-a, en 1526 okazis decida atako de la turkoj kontraŭ Hungario. La regantaj klasoj ne kuraĝis armi la kampularon; tiamaniere en la batalo ĉe Mohács 80 mil turkoj renkontiĝis nur kun 25 mil hungaroj. La batalo finiĝis per terura malvenko de la hungara armeo, kiu perdis 15 mil homojn. Dum la fuĝado, mortis ankaŭ la hungara reĝo.

Kapoj de turka nobelo kaj hungara militisto. Fragmento el la pentraĵo de la samepoka Majstro M. S.



Ekzekuto de Georgo Dózsa, sur la titolpaĝo de „Tauromakio" de Taurinus, eldonita en 1519 en Vieno

Hungario kaj la naciaj malplimultoj

Germana studhoro en Horvátzsidány, malgranda vilaĝo en departemento Vas

La nuntempa fizionomio de la naciaj malplimultoj en Hungario elformiĝis dum longaj jarcentoj de nia historio. Ĝi surhavas la spurojn de la historia pasinto plenplena de gravaj tempestoj. La plurjarcenta turka subpremo grandmezure malhelpis la procezon, ke la ĉi tie vivantaj popoloj povu fariĝi nacioj same la elformiĝon de naciaj ŝtatoj. La turka regado kaj la senĉesaj liberigaj bataloj kvazaŭ tute ekstermis la loĝantaron sur grandegaj teritorioj. Sur la vakantaj teritorioj komencis ekloĝi koloniuloj, kiuj devenis el najbaraj landoj kaj regionoj, kie ne estis turka detruado. La koloniigon akcelis precipe la Habsburga dinastio; fine de la 16-a jarcento, post la kontraŭturkaj liberigaj militoj, oni loĝigis germanojn, sudslavojn, rumanojn, slovakojn sur la senhomiĝintaj teritorioj, sed inter la koloniuloj troviĝis ankaŭ poloj, ĉeĥoj, francoj, italoj.

En Hungario restis – inter la limoj elformiĝintaj post la unua mondmilito – relative malmulte da nehungaraj loĝantoj. Ankaŭ ilia nombro malkreskis dum la dua mondmilito. Tiam, laŭbaze de la Potsdam-a konvencio, oni loĝigis ĉ. 170.000 hungarlandajn germanojn en Germanio. Post iniciato de la ĉehoslovakia registaro, rezulte de loĝantar-ŝanĝo en 1946–48, ĉ. 73.000 slovakoj forlasis Hungarion. Tiamaniere la nombro de la germanoj kaj slovakoj, vivantaj en Hungario, grandmezure malpliiĝis.

La nacimalplimultaj grupoj, vivantaj sur la teritorio de Hungario – krom malmultaj esceptoj – jam antaŭ jarcentoj perdis la senperan kontakton kun la propra nacio, kun ties nacia evoluo.

Pro la supremenciitaj kialoj Hungario estas proksime al tio, ke oni konsideru ĝin pure nacia ŝtato, tamen la ŝtatgvidado zorgas atente pri konvena, ĝusta politiko pri naciaj malplimultoj, ĉar ties principan signifon ĝi ne konsideras dependa de la nombro de la ne-hungara loĝantaro.

La fundamenton de la politiko pri naciaj malplimultoj de la Hungara Popolrespubliko enhavas nia konstitucio, validiĝinta en 1949. Ĝi fiksis tion jene: „La ŝtatanoj de la Hungara Popolrespubliko estas egalaj antaŭ la leĝo kaj ĝuas egalajn rajtojn. Ian ajn diskriminacion inter la ŝtatanoj laŭ sekso, konfesio aŭ nacia aparteno, la leĝoj severe punas. Estas garantiata por ĉiu nacia malplimulto sur la teritorio de la Hungara Popolrespubliko la eblo de propralingva instruado kaj flegado de la nacia kulturo."

La ne-hungara loĝantaro, krom tio, ke ĝi konscie praktikas kaj uzas sian propran gepatran lingvon, samtempe volonte uzas ankaŭ la hungaran lingvon. Hodiaŭ jam estas direble, ke – escepte kelkajn izolitajn koloniojn kaj la tre maljunajn homojn – la ne-hungara loĝantaro uzas la hungaran lingvon samnivele kiel sian gepatran lingvon.

Konsiderante la tendencojn de la politika, socia kaj ekonomia evoluo de nia lando, ni povas konstati, ke la ne-hungara loĝantaro ĉiamaniere integriĝis en nia socio kaj ŝtato, ĝi estas aktiva partoprenanto de la evolua procezo sur ĉiu tereno de la vivo.

La nacimalplimulta loĝantaro vivas dise en la tuta lando – escepte unu departementon – kune kun la hungaroj, ofte en miksaj kolonioj. Tamen tio ne signifas, ke ĉiuj membroj de la minoritatoj apartenas al la kampularo.

Oni zorgas pri tio, ke la ne-hungara loĝantaro, konforme al sia proporcio, ricevu reprezentadon en la lokaj resp. departementaj konsilantaroj. En la parlamento ni trovas deputitojn el ĉiuj kvar ekzistantaj naciaj malplimultoj. Tiel same – laŭ la egalrajteco – ĉiuj membroj de la malplimultoj havas voĉdonrajton. La Patriota Popolfronto zorgas pri tio, ke ĉe la elektoj je ĉiu reprezentada nivelo estu ne-hungaraj kandidatoj en proporcia nombro.

Nia politiko pri naciaj minoritatoj havas la ĝeneralan praktikan principon, ke ĉiu hungarlanda institucio zorgu pri

Ĉiutage aperas miloj da ĵurnaloj por la naciaj malplimultoj

1 **Slovakan lingvon lernas la infanoj en la slovaka kolegio en Békéscsaba**

2 **Bazlernejo, gimnazio kaj kolegio funkcias en Budapeŝto por serbo-kroatlingvaj infanoj. Infanoj el la unua klaso.**

3 **Antaŭ la ekzamenoj en la bulgara lernejo en Budapeŝto. La dancgrupo de la lernejo preparas sin por la ferma solenaĵo.**

la plenumo de la bezonoj, kiuj leviĝas sur sia propra laborsfero. Por akordigi ĉi tiun diverĝan taskon, la Ministerio pri Kulturo kreis Konsil-komitaton pri Naciaj Malplimultoj. En la laboro de la Komitato partoprenas ne nur ministerioj, sed ankaŭ la demokratiaj asocioj de hungarlandaj sudslavoj, germanoj, slovakoj kaj rumanoj.

Koncerne la instruadon en la ĝeneralaj lernejoj, leĝo deklaras, ke en ĉiu lernejo, kie almenaŭ gepatroj de 15 gelernantoj deziras, la instancoj devas garantii la instruadon de la gepatra lingvo. La samo koncernas ankaŭ la lingvoinstruadon en infanĝardenoj.

La Patriota Popolfronto subtenas kaj instigas la kontentigon de la lernejoj, kulturaj pretendoj de la minoritatoj. Pro tio la Patriota Popolfronto dum la reelekto de siaj lokaj, teritoriaj kaj tutlandaj korporacioj zorgas pri tio, ke tiuj repegulu la konsiston de la loĝantaro ankaŭ rilate la nacian apartenon. En la laboro de la 4 asocioj de naciaj malplimultoj okupas centran lokon la agado koncerne la kulturon kaj konsciformadon. Ĉirilate ilia ĉeftasko estas helpi kaj evoluigi la kulturon de la ne-hungara loĝantaro, sur la tuta tereno de la lando. La asocioj ne havas lokajn organojn. Ili estas en laborkontakto kun la lokaj grupoj kulturaj de la koncerna nacimalplimulto.

Ĉe la vidpunkto de la estonto de la malplimultoj grava faktoro estas la lerneja instruado. Nia ŝtato garantias la eblon, por ke la kreskanta generacio de la naciaj malplimultoj povu kulturiĝi pere de sia propra lingvo. Nuntempe pli ol 900 pedagogoj instruas pere de la gepatraj lingvoj de la malplimultoj.

Ankaŭ sur kultura tereno hungarlandaj germanoj, rumanoj, slovakoj kaj sudslavoj havas gravan rolon. Nuntempe 243 kulturaj kluboj de naciaj malplimultoj agadas dise en la lando.

Fine kelkajn vortojn pri la nombraj proporcioj de la hungarlandaj nacimalplimultoj. Ĉiuj ili sume formas 4%-ojn de nia tuta loĝantaro.

La élej grandnombra grupo, ĉ. 200.000 personoj estas la germanlingva malplimuto, kies kolonioj troviĝas ĉefe en le departementoj apud la norda-suda fluo de Danubo, sed kelkaj vilaĝoj troviĝas ankaŭ norde de Balatono.

La slovaklingva malplimulto nombras ĉ. 110.000. Ili ekloĝis precipe meze de la norda landlimo, dum kelkaj grupoj el ili vivas ankaŭ en Transdanubio, kaj eĉ apud la sudorienta landlimo.

Apud la suda kaj okcidenta landlimo situas la grupoj, sume 100.000 loĝantoj de la sudslavoj. Ilia plimulto konsistas el kroatoj.

La plej malgrandan ne-hungaran grupon de, ĉ. 25.000, personoj formas rumanoj, loĝantaj ĉe la suda parto de nia orienta landlimo.

Garantii plenan – praktike ĝueblan – egalrajtecon por la naciaj malplimultoj ankaŭ sur kultura tereno ne signifas nur plenumi dezirojn de la ne-hungara loĝantaro. Kiam ni faras ĉion por tio, ke hungarlandaj germanoj, rumanoj ktp. fartu bone ĉi tie, ili rigardu Hungarlandon sia patrio, ni agadas konforme ankaŭ al niaj *naciaj* interesoj: ja lando, en kiu ekzistas grupoj senigitaj je iuj rajtoj, neniam povas sin nomi libera.

Samtempe tiuj malplimultoj helpas al ni formadi nian pensadon pli internaciisma, kaj ili brave kontribuas ankaŭ al intensigo de amikaj rilatoj kun la landoj, el kiuj antaŭ centoj da jaroj iliaj prauloj ekmigris al Hungario.

István *László*

PANORAM

Parto de nova vilaĝo-muzeo en la Transdanubia vilaĝo Szenna

Vilaĝo-muzeoj

Paralele al la rapida modernigo de la loĝejoj kaj labormetodoj eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj de la lando, oni klopodas ĉie protekti ion karakterizan el la paseo, ion, kio prezentas la krean fantazion de la popolo. En la lastaj jaroj en pluraj vilaĝoj de Hungario estis rekonstruitaj, kaj laŭ originalaj modeloj establitaj loĝdomoj, metiejoj kun malnovaj iloj kaj mebloj.

En la departemento Szabolcs-Szatmár (Orienta Hungario) preskaŭ tuta vilaĝo estos konstruita el domoj de la ĉirkaŭaj regionoj. Antaŭ ok jaroj komenciĝis la kolektado kaj protektado de altvaloraj dokumentoj je kies rezulto nun staras jam kvardek domoj, baskulputo – parto de originala vilaĝo. En la sekvontaj jaroj oni planas konstruigi preĝejon kun paroĥejo kaj sonorilejo laŭ la popola konstruarto de Erdőhát kaj Nyírség, – aliaj orientaj regionoj de Hungario.

Hungara koruso sur la Filipinoj

Je la invito de la kulturcentro de Manila la Kodály-koruso de Debrecen partoprenis la unuan azian koruso-festivalon sur la Filipinoj. La hungara koruso prezentis komponaĵojn de Bartók kaj Kodály kaj, okaze de la „hungara tago", ĥorverkojn de nuntempaj hungaraj komponistoj. Post la festivalo la koruso faris koncert-rondvojaĝon ankaŭ en aliaj urboj de la lando.

La Kodály-koruso de Debrecen sur la podio de



Partnero: la MAPEGAZ

Nova interkonsento por kooperado

La evoluigo de la francaj-hungaraj ekonomiaj kontaktoj atingis novan etapon en la lastaj du jaroj. En 1978 la valoro de la varinterŝanĝo superis 250 milionojn da dolaroj. Laŭ la fakuloj de ambaŭ landoj ĉi tiu komerca interrilato estas ankoraŭ forte evoluigebla. Unu estas el la vojoj por atingi ĉi tiun celon: plivastigi la rondon de la kontaktoj por kunlaboro.

La plej nova paŝo estas sur ĉi tiu tereno, ke komisie de la Hungarlanda Ŝtonoleo- kaj Gasindustria Trusto la *Interkooperatio SA* kaj la eksterakomerca entrepreno NIKEX interkonsentis pri kunlaboro por dek jaroj kun la franca firmao MAPEGAZ. Laŭ la kontrakto la hungara Transdanubia Ŝtonoleo-industria Maŝinfabriko produktos specialajn globkranojn kaj por la franca *know-how* (scii kiel) ĝi pagos per liverado de ĉi tiuj produktaĵoj. Estas atendeble de la kooperado, ke anstataŭ importo en valoro de unu miliono da dolaroj ni povos kontentigi ĉiujn bezonojn enlandajn, krome ankaŭ eksporti el ĉi tiuj gravaj elementoj.

Muntado de globkranoj en la Transdanubia Ŝtonoleo-industria Maŝinfabriko



*** PANORAMO





András Sütő

Ferenc Farkas

uzikarta Altlernejo de Budapeŝto.



Herder-premio al du hungaroj

Speciala komisiono de la Universitato de Vieno ĉiujare premias tiujn elstarulojn de Mez- kaj Orient-Eŭropo, kiuj kontribuas per siaj verkoj al la progreso de la universala kulturo. En 1978 du hungaroj ricevis ĉi tiun distingon pro evoluigo kaj flegado de kontaktoj interpopolaj; Ferenc Farkas, Kossuth-premiita komponisto kaj András Sütő, elstara reprezentanto de la hungara kultura vivo en Rumanio.

La Herder-premio estos transdonita la 3-an de majo 1979 en la Universitato de Vieno.

Stalagmita groto trovita

En la montaro Bükk, Norda Hungario, oni malkovris stalagmitan groton okaze de malfermo de kalkminejo. La murojn de la haloj de la ĝis nun tute nekonata groto-komplekso kovras stalagmitoj kaj stalagtitoj brilaj en multaj koloroj. La akvo debito de al la groto proksima rivereto, laŭ la observo de la vilaĝanoj kaprice ŝanĝiĝas, ofte la rivero tute malaperas. El tiu fakto la geologoj konkludas, ke verŝajne troviĝas en la profundo ankaŭ alia groto aŭ groto-komplekso.

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

HB 240 ***



HÜTÖGÉPGYÁR

Jászberény

REVUO DE REVUOJ

La organizita E-o movado disvastiĝas okulfrape. Nia lingvo kaj ĝiaj organizoj reakiras prestiĝon, kie tio mankis dum certa tempo. kiel en *Rumanio*, kaj organizoj ankaŭ en aliaj landoj aperas super la surfaco, kiel novaj insuloj en la komunika kaoso. En lando ne granda, kiel *Pakistano*, jam troviĝis forto organizi E-kongreson, laŭ plezuriga informo de revuo ESPERANTO. Tie ĉi oni eldonis urdulingvan lernolibron kaj baldaŭ ankaŭ vortaron, montriĝas vigla vivo en pluraj urboj. Apud la vasta agado, neniel laciĝinta, en Irano, oni rimarkas facile el la informoj la utilegan disradiadon de nia ideo en Azio. Jes, ideo pri internacia lingvo, pri ties graveco por la tuta homaro – sufiĉe kompleksa ideo, kiu elvolviĝis el la bazo de la socio, kaj aktivas en la sfero de la socistrukturo, per siaj institucioj, samkiel ĉiu alia kategorio de la idearo. Ni firme atendas, konsciante ke la mondo niatempe akceliĝante progresas, ke la lingva problemo pli kaj pli akriĝos, sekve bezonas solvon – kaj tion jam multaj konas, ne nur ni. Do, sen aparta mencio de la informantaj gazetoj, HEROLDO, KONTAKTO, k.a., ni povas registri kontente – tamen bonvolu ne kontentiĝi, sed fosi ankaŭ vian sulkon! – plivigliĝon kaj organizitajn antaŭenpaŝojn, en tre diversaj landoj, ankaŭ en PR Ĉinio, en Suda Koreo.

Certe Renato *Korseti* pravas, kiam li avertas, ke lingvo, respektive lingvistiko ne certe (kaj tutcerte ne rapide) faciligos vivon de popoloj, ili havas ja gigantajn problemojn; eblas foje, ke oni kvazaŭ persone amuzos sin per E-o (je nenies malutilo), tamen la socio apenaŭ povos tiun ringe striktan afereton apreci utila por la mondo. Ĝuste tial ni devas klare konscii, ke nian problemon antaŭas aliaj ĝeneralaj kaj urĝaj problemoj de socioj, kvankam ne maleblas, ke IL iom paralele kun tiuj, aŭ nur iomete malantaŭe progresos en la diversaj mondaj regionoj.

Honeste kaj por ne-anglo aparte interese sumigas *The Worker Esperantist* rimarkojn kaj komentojn de britoj pri sia lando. Komparante kelkajn aferojn, pli-malpli gravajn, inter Britio kaj aliaj landoj, ili devis rezigne konstati, ke Britio plejparte ne aspektas favore – almenaŭ en la cititaj komparoj. Nu, povas esti tiel, pri tio ni ne rajtas mediti, la sana memkritiko apartenas ja al la homaj devoj en la socio, kompreneble ankaŭ al la homaj rajtoj kiel sciate. Mian miron okulkreskige gapigis la modesta „komento de iuj", laŭ kiuj la brita registaro *„ne sufiĉe regas* privatan industrion por . . ." „sekurigi la bonfarton *de la publiko*". Mi hmhmis, heheis, cocois murmure, lange, ĝis mi fermis okulojn, kaj pripensis la malfacilan sorton de la brita registaro, de kiu estus postulata neeblaĵo: regi la privatan industrion, la posedantojn de la plejparto de la nacia havaĵo, ĉu? „Eble inverse vi imagas? " respondus submanplate kaj susure *iu ministro*, „ke ni regu ilin? Ili regas firme nin, kara mia, ho-ho!" Kie la mono, tie la forto. Ekonomia kaj influa. La maŝinaro, la varo-magazenoj apartenas al ili, disponi brita registaro povas nur tiom, kiom ili allasas. „Aŭ eble vi revoluciemas", susuras plu la ministro al nia samideano iom severe, „tiam vi jam forĵetus la liberecon! For la manojn de la fabrik-posedaĵo, ĝi ne apartenas *al la publiko*, kia impertinento!"

Pri Esperantaj eldonejoj oni legas en la multmerita kaj multflanka HEROLDO, el kio mi ĉerpas la gravegan tezon pri la nuntempa literaturo: ĝin kreas *ne sole* verkistoj, kunkreas ankaŭ eldonistoj kaj *aĉetantoj–legantoj!* Diable grave! Kaj diabla rondo estas en Esperantujo – kion nur foje trarompas libro –, la kavalkado de verkisto, la laciĝo de eldonisto malgraŭ sia fervorega kaj apenaŭ imagebla organiza plenumo. Nur malfacile renkontiĝas libro kaj leganto, bone konata fakto, ĉu mi denove priplendas tion? Jam enue . . . Tamen la libroserio eldonita de *Plejado-Gabrielli* okupas vere indan lokon sur niaj librobretoj, per klasikaĵoj valoraj ni povas fieri, sufiĉas mencii *La renesanca periodo*-n de Waringhien. Pri nia libroeldonado ni skribis jam alifoje ne malmulton; sed ne eblas sufiĉe diskrii, persvadi ĉiun legemulon, ke tra ĉiaj malfacilaĵoj personaj, financaj, per belaspekta oferado daŭre subtenu la literatur-eldonadon Esperantan, kaj pro plezuro, kaj pro konscio!

Ŝajnas al mi agrable, ke en niaj gazetoj, eĉ en bultenoj, malabundas nun lingvaj kvereloj, kiuj tro ofte prenis aspekton de remaĉado eterna de kelkaj fenomenoj en nia lingvo. En lingvo-orientita medio kiel la nia ne estas mirinde okupiĝi pri tiaĵoj, sed ĉio havas ja limojn, kaj la kolumnoj altprezaj havas ankaŭ aliajn celojn kaj skribendojn, *ne nur* tiajn. Ne komprenu tion mise! Necesas esencaj, profundaj lingvistikaj temoj, kaj same la „ĉiutagaj", instruaj „lingvaj anguloj" kaj similaj por firmigi kaj levi la ĝeneralan nivelon de lingvoscio. Multloke estas tiaj lingvogardaj rubrikoj legeblaj. *Avoto* en *Brita E-isto* atingis meritite mondan famon kaj aŭtoritaton per siaj plensciaj, serioze argumentitaj rimarkoj, al kiuj li plenmane surpaperigas el admirinda kolekto de citindaĵoj. Pensmanieroj de popoloj paralelas kompreneble kun siaj lingvaj esprimoj; aŭtoroj kaj „gardistoj" bone atentu do, forte flegi la *internacie kompreneblajn* pensmanierojn, interlingvajn esprimojn, eĉ se ili ne ĉiam kapablas heredi tradiciaĵojn, alilande ne kompreneblajn dirmanierojn. Internaciismo ĉiusence *postulas disciplinon*, ĉar ĝi devige altrudas *homecan akomodiĝon!*

Ervin *Fenyvesi*

Sarlanda Esperanto-Ligo

garantio por solida Esperanto-laboro

– **aranĝas Kulturajn Semajnfinojn dufoje ĉiujare;**

– **eldonas kvaronjaran kulturan-literaturan revuon DIALOGO kun ampleksaj recenzaj rubrikoj kaj internacia kunlaborantaro;**

– **eldonas Esperanto-librojn (i.a. de Auld, Boulton, de Diego, Kalocsay, Ribillard, Rossetti, Varankin, Wingen, Wüster k.a.)**

– **gvidas internacian libroservon kun larĝ-paleta sortimento;**

– **plenumas informan laboron pri Esperanto en FRG.**

Petu senpagajn programojn, prov-numeron aŭ libro-katalogon ĉe:

Sarlanda Esperanto-Ligo
Schulstr. 30
D-6601 Scheidt

Tel. 068/81 16 53
pĉk Saarbrücken 5358/663



Akvoprovizado de la refreŝiĝejoj en la montaro Mátra – problemo solvita

Inter la montaraj kaj monteta j regionoj de Hungario okupas elstaran lokon la montaro Matra. Ĝiaj naturaj belecoj allogas tien dekmilojn da homoj por semajnfina ripozo aŭ por daŭre seniĝi de la ĉiutagaj zorgoj.

Inter multaj aliaj refreŝiĝejoj la kuracbanejo Parádfürdő, la ripozejo Mátraháza, la skideklivoj, ekskursejoj de Galyatető, kaj Kékes, la plej alta montsupro de Hungario (1015 m) estas famaj lokoj por ripozado kaj turismo. La kuracadon de la tion bezonantoj prizorgas sanatorioj – ne nur per modernaj instalaĵoj, sed ankaŭ per naturaj dispozicioj: saniga mikroklimato, pura aero, trankvilo de la mirinda montar-pejzaĝo.

La montaro Matra gravas ankaŭ por la ekonomio de Hungario. Tie troviĝas la erc-minejo de Recsk (kupro, arĝento) kaj preskaŭ 10% de la arbaroj de la lando.

La belecoj de ĉi tiu regiono vekis kreskantan turisman interesiĝon kaj la deziron eluzi la eblecojn por ripozo kaj refresiĝo. La nepre necesa multdirekta evolvigo dum la lastaj jaroj realiĝis. Ĝojige multobliĝis ripozdomoj kaj belaspektaj amuzejoj, grandpaŝe evoluis ĉiuspecaj komfortaĵoj. La kreskanta nombro de turistoj kaj ripozgastoj pliigis la akvobezonon. Tio estas natura sekvo de la evoluo en ĉi tiu regiono, kie la eblecoj por akvoprovizado estas limigitaj. Tial oni devis konstrui akvorezervujojn, por solvi la zorgojn de la tutjara akvoprovizado.

Antaŭ nelonge la disvolviĝon en tiu ĉi regiono ege malhelpis la manko de komunumaj servoj, unuavice de akvoprovizado. La eksplodsimila kresko de fremdultrafiko kaj la evoluo de enlanda turismo pligravigis la akvoproblemon. Inter aliaj ankaŭ Mátraháza, Kékestető, kaj Parád ne povis akcepti la aron da gastoj rajte pretendantaj kulturitan medion.

Depost la jaro 1960 la situacio radikale ŝanĝiĝis rezulte de la konstrulaboroj realigitaj laŭ la evoluiga projekto ellaborita por la tuta regiono de Mátra.

Por provizi per akvo la refreŝigejan zonon, la Matra-Regiona Akvoproviza Sistemo (inaŭgurita novembre de 1978) liveras akvon el la rezervujoj de Köszörü-völgy kaj Csórrét. Tiuj virkoj* estiĝis en la kadro de la evoluiga programo, elektinta la konstruadon de regionaj akvoprovizaj sistemoj, kiel ĉefan rimedon por kontentigi la bezonon de la loĝantaro.

Laŭ la perspektiva evoluiga projekto en la unua etapo pleje necesas konstrui la surfacan akvorezervujon de Köszörü-völgy, por provizi per akvo la koloniojn situantajn sur la norda deklivo de la montaro Mátra. Ties realiĝo por longa tempo solvis la akvozorgojn de Parád, Parádfürdő kaj Recsk. Ankaŭ pluaj kolonioj de tiu ĉirkaŭaĵo povos aliĝi al tiu akvoproviza sistemo.

Sed tio estis nur komenco de la efektivigota akvoprovizado. La plano preskribis trovi rapide kaj ekonomie

realigeblan solvon de la provizora akvoprovizado de Mátraháza, ĉar la debitoj de la ĝis tiam funkciantaj fontoj tre malpliiĝis kaj la akvokvalito malboniĝis. Ili jam ne povis kontentigi la pretendojn kaj pro tio oni devis urĝe dispozicii. En la dua etapo de la evoluiga programo oni devas purigi kaj desinfekti la surfacan akvon ĉerpitan el la rivereto Nagy, trafluigante ĝin tra malrapid-filtrilo, kaj disponigi al Mátraháza. La bezonataj virkoj estas jam pretaj, ĉesis la akvoprovizaj malfacilaĵoj. La plia disvolviĝo de la ripozejo ebliĝis. Eĉ oni povas transdoni akvon al la kampadejo de Sóstó kaj solvi la gravajn akvozorgojn de Kékestető. La ĉefaj virkoj de la dua etapo (akvoduktaroj, basenoj) pretiĝis tiadimensie, ke post la konstruado de la rezervujo en Csórrét projektata por la tria etapo, ankaŭ la perspektivaj akvobezonoj estu kontentigeblaj, sen granda plilarĝigo.

Nun, kiam estas preta la rezervujo de Csórrét, la malrapida filtrilo de la rivereto Nagy jam perdas sian primaran rolon. Tamen ĝia signifo ne malgraviĝas, ĉar ĝi ebligas eksperimentadon per malrapida filtrado, kiel lasta ŝtupo de surfaca akvopurigado.

La evoluiga projekto ellaborita por solvi la akvoproblemojn de la regiono de Matra malkaŝis (precipe en la meza subregiono) la eblecojn de akvoprovizado, ties teknikajn kaj ekonomiajn aspektojn.

Gravan teknikan problemon prezentis la montaraj diferencoj de alteco. Tiakaŭze oni devis plurloke apliki altegajn premojn.

Alia tasko estis decidi pri la konvena akvopuriga teknologio. Komencinte la projektadon oni povis konkludi je la atendebla kvalito de la akvo amasiĝonta en la

Digo de la akvorezervujo de Csórrét.

*virko = ingeniera konstruaĵo

Solena inaŭguro de la akvorezervujo kaj akvopurigejo de Csórrét.



Akvorezervujo de Csórrét

trinkakvo-rezervujo nur el la periode variaj kvanto kaj kvalito de la surfacaj akvoj. Detalaj esploroj necesiĝis por elekti la plej konvenan lokon de la rezervujo, la uzendajn materiojn, kaj la metodon de realigo. Precipe gravis tio en kazo de la rezervujo de Csórrét, kiu estas la plej alta valferma digo en Hungario. Pro la malfacilaj teknikaj kondiĉoj prezentiĝis la demando pri ekonomieco. Estis trovenda la optimuma solvo, certiganta la plej malmultekostan, sed tamen bonkvalitan akvon.

La plej grava problemo de akvoprovizado en la meza subregiono de la montaro Matra estis: kiel akiri la necesan akvokvanton? Laŭ la perspektivaj planoj oni devas provizi per akvo 21 000 homojn, kies akvobezono estas kalkulita maksimume je 3500 m^3/tago. La ekzistantaj, memstaraj akvoprovizejoj de la ripozejoj kaj sanatorioj povas liveri nur rondcifere 500 m^3/tago. Eĉ parto de tiu kvanteto devenas el sanitare ne bonkvalitaj, poluitaj putoj (fositaj aŭ boritaj), kiuj estas malbone enkadrigitaj kaj ne posedas konvenan protektan areon. Por kontentigi la nunajn bezonojn ili ofte ne taŭgas. Ili estas disŝutitaj sur vasta teritorio, havas malgrandan debiton, estas neŝirmitaj kontraŭ polucio kaj kontraŭ la forsuĉa efiko de minejoj. Nek teknike, nek ekonomie, nek funkciige estas eble bazigi la akvoprovizadon de la loĝlokoj kaj ripozejoj en la regiono de Matra sur tiuj fontoj. Krome, ĉiujn uzindajn fontojn oni jam pli frue alligis, la aliajn ne indas utiligi pro ilia eta debito kaj disa situo.

La debito de la fontoj estas tre ŝanĝema: La minimumoj koincidas kun la maksimuma bezono: ili do ĝuste tiam ne donas kontentigan kvanton de akvo kiam tio estus pleje bezonata. Estis konstatite, ke la bezonoj ne estus kontentigeblaj eĉ se oni utiligus ĉiujn konatajn fontojn. Krome, kelkajn alligitajn fontojn oni devis lasi ekster kalkulo, ĉar ili jam tute elĉerpiĝis, aŭ ilia akvokvalito tro malboniĝis. Ankaŭ la mastrumado je sovaĝbestoj kaj la turismo bezonas liberan uzon de la fontoj.

Simile al la fontoj, ankaŭ la surfacaj akvokvantoj dependas de la precipitaĵoj kaj de la degelado de neĝo. Somere ne sufiĉus eĉ la totala ekuzo de la malaltakva trafluo de la riveretoj.

La unusola ekonomie realigebla solvo estas: konstrui la akvorezervujon de Csórrét, kiu perspektive provizos per akvo la tutan mezan subregionon de la montaro. Tiu rezervujo en la barita valo de la rivereto Nagy kolektas la akvon de tiu rivereto (havanta dumjare tre ŝanĝeman debiton.) Per purigado ĉi tiu akvo fariĝas trinkebla.

La akvokolekta areo estas de 8,38 km^2, situanta sur la suda deklivo de la montaro Matra. Ĝi estas grandparte

kovrita de arbaro, kaj la subgrundo estas solida. Por la hidrologia dimensiado oni utiligis la rezultojn de la kontinua mezurado de debitoj dum la lastaj kvin jaroj kaj la precipitaĵ-indikoj de 36 jaroj.

La utiligebla volumeno de la rezervujo estas unu miliono da m^3. Por la superfluigejo oni kalkulis kun 20 m^3/sek laŭ la maksimuma inundo kalkulita por 200 jaroj. Sur plej granda parto de la rezervujo la substrato konsistas el plurcent-metrojn dika aro de andezitaj rokaĵoj, kovrita per disloziĝinta rub-tavolo.

La valbara digo konsistas el ses elementoj.

a) Sekflanka apogkorpo, el argilo de Csórrét;
b) Akvoflanka akvobara korpo el argilo de Nyirjes;
c) Vertikala likejo el sablaj gruzeroj alportitaj al la konstruejo;
d) Akvoflanka apogkorpo el la valfunda materio;
e) Likadsistemo;
f) Akvoizola betonmuro ĉe la fermo de la valfunda akvotralasa (permeabla) tavolo.

La longo de la valbara digo, mezurita sur la digokrono, estas 190 m; ĝia alto: 27 m. Plej granda bazlarĝo: 2085 m; larĝo de la digokrono: 5 m.

La digodeklivon sur la akva flanko kovras beton-tabuloj, la sekan taluson – herboj.

La akvomastruma komplekso estas konstruita en la digokorpo. Ĝi ebligas la plenan funkciigon de la rezervujo, nome la prenon de la kruda akvo je la laŭkvalite plej favora nivelo, la trakondukon tra la valfermaj digoj de la altakvoj alvenentaj en la plenan rezervujon, la partan aŭ kompletan malplenigon de la rezervujo, kaj ankaŭ la akvoforkondukon dum la digokonstruado. Ĝi konsistas el turo havanta duoblan muron, kies ekstera diametro estas 6,5 m. La turo havas trafaligan funelon. Al la bazo de la turo aliĝas ferbetona tubtunelo havanta kvarangulan sekcon (internaj dimensioj: 1,6 X 2,0 m). Tiu finiĝas en kvietiga baseno, de kie la akvo pasas en la malsupran forfluigejon.

La kolektita surfaca akvo estas purigata en la akvopurigejo konstruita sub la rezervujo. Ĝi povas purigi akvokvantojn meze 2800 m^3/tago, maksimume 3600 m^3/tago. La krudakvo trairas unue kadrigitajn filtrilojn, destinitaj por forigi la iom grandajn sedimenterojn. Poste tra la malrapidigiloj ĝi pasas en la flokigejojn, kie okazas la kemia manipulado. Oni aldonas sulfaton de aluminio, permanganaton de kalio kaj (surbaze de la spertoj akiritaj dum la provfunkciigo) ankaŭ „kalko-lakton". La dozigo de la kemiaĵoj el la surteraj magazenoj okazas per ŝarĝolifto kaj „kurkato". Por solvado kaj miksado de la kemiaĵoj servas kuvoj. De tie oni gravite dozigas la kemiaĵojn al la krudakvo. (La kuvoj troviĝas super la flokigejoj sur la plej supra etaĝo de la konstruaĵo.) Poste la akvo alvenas en la kvarangulan klarigejon, por forigi la etgrajnajn materiojn el la akvo. Pro la efiko de la kemiaĵoj aldonitaj kaj pro la procezo okazanta dum la klarigo, la etdimensiaj malpuraĵoj flokiĝas kaj demetiĝas sur la fundon, de kie ili estas forigeblaj. En la klarigejo granda parto de la malpuraĵoj foriĝas. Nun la akvo trapasas la rapidan filtrilon, kie filtriĝas la ankoraŭ ĉeestantaj malpuraĵoj. La trapasinta akvo post desinfektado jam havas kvaliton de trinkakvo; ĝi kolektiĝas en la purakvujo.



Akvopurigejo kaj laborejkonstruaĵo en Csórrét.



Maŝinejo de la akvodistribuejo de Csórrét



Akvorezervujo de Köszörüvölgy

La moderna Nord-hungaria Regiona Akvoprovizada Sistemo kapablas provizi per trinkakvo la mezan subregionon de la montaro Matra. Ĝi posedas konvenajn akvorezervojn, sufiĉajn eĉ por la estontaj bezonoj. Ĉesas la ĝisnunaj akvorilataj plendoj. Estas solvita la problemo de akvoprovizado, malhelpinta la disvolvigon de ĉi tiu regiono. Tiamaniere ebliĝas grandskala evoluigo de la refreŝigeja zono. Kompreneble estos necese plievoluigi la regionan akvoprovizadon. La tiurilataj planoj jam estas pretaj. Kiam la akvorezervujo de Csórrét jam ne kontentigos la bezonojn, la ĝis tiam finkonstruota rezervujo de Hasznos donos akvon de 2000 m^3/tago. Cetere, diversaj konsideroj de akvomastrumado kaj funkcio-sekureco rekomendas kunligi la rezervujojn de Csórrét kaj de Köszörüvölgy.



La konstruota akvorezervujo de Gyöngyössolymos, krom provizi per akvo la urbon Gyöngyös, per kondukilo estos kunligita (tra Mátrafüred kaj Mátraháza) kun la Matra-Regiona Akvoprovizada Sistemo. Ĉi tiu ebligos aligi tiun regionon al la landa akvoreto.

Pro ekfunkciigo de la rezervujo de Csórrét oni devas kalkuli je impeta plinombriĝo de privataj domoj pretendantaj je akvoprovizado, kaj estas atendebla estiĝo de novaj refreŝiĝejoj.

Pro tio oni nepre devas solvi la problemon de la poluakvoj. Tiu problemo estas speciale grava ĉe Galyatető kaj en la kolonioj situantaj okcidente de ĝi, ĉar tie la



Unu el la virkoj de la akvorezervujo de Köszörüvölgy

polucio povus danĝerigi la akvorezervujon de Hasznos, konstruota enkadre de la investado por krei la Regionan Akvoprovizadan Sistemon de la meza regiono de la Departemento Nógrád. Nome ĉi tiuj kolonioj troviĝas en la akvokolekta areo de la rezervujo. Laŭde menciindas la iniciato de la Heves-Departementa Konsilantaro, ke oni komencis antaŭprepari la investadon por solvi la problemon de poluakvo-forfluigado kaj estigi akvopurigajn instalaĵojn, laŭ la studprojekto de Hidrologia Projektada Entrepreno (VIZITERV). Bonaj aŭspicioj estas por baldaŭa realiĝo de tiu projekto.

Por plenumi la taskojn de akvoprovizado en tiu regiono, la Landa Hidrologia Oficejo jam antaŭ la komenco de la investado komisiis la Nordhungarian Entreprenon por Regiona Akvoprovizado kaj Akvomastrumado organizi tie memstaran uzin-direktoraron kaj estraron por tiaspecaj taskoj. Tiu dispono ege kontribuis ke la funkciado okazu optimume kaj laŭ unueca koncepto. La funkciiganto partoprenis en la realigo de la tuta investado, ekde la projektado ĝis la pretigo. Tia metodo montriĝis tre utila kaj favore influos la efikecon de la estonta funkciigo. La akvo-prizorgado de grandaj teritorioj solveblas nur per tiaŝistema organizo de laboro.

La fino de la tria etapo de la konstruado de la Matra-Regiona Akvoprovizada Sistemo signifas la finon de la lasta fazo de la granda projekto komencita en 1960. La rezulto estas, ke la problemo de akvoprovizado en tiu regiono estas solvita. Tio malfermas la vojon al popolekonomie grava disvolvigo. Tiu ekonomia kaj samtempe politika rezulto baldaŭ favore influos la ekprosperiĝon de la tuta teritorio, ĉar ties plej grava malhelpo estis la nesolvita akvoprovizado.

Tradukis A. *Pechan*

PANNONIA







PANNONIA Eksterakomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850. Teletajpilo: 225128 PANEX–H
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. 1394

•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[2]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
– Elektraj tajladmaŝinoj
– Kudromaŝinoj
– Gladmaŝinoj
– Gladilaro
Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ- kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
– Pintigmaŝinoj
– Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
– Longigaŭtomatoj por tubo kaj stangoj

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktato de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por munti biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo, vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how**: fabrikad-teknologio, »scii kiel«

Tr. Alfonso *Pechan*

Julio Varga

Miniaturoj

La najlo

Ĝin premas pli profunden ĉiu bato,
la febla dekliniĝas sub la fato.

En dom' vantadas lustro, bild' parade;
ĝi tenas alkroĉitan ŝarĝon ade. –

Ĉu la batanto estas la pli granda,
aŭ najlo, servon kun humil' faranta? ...

Mano manon lavas

Belas, se helpas la homo al hom', sed kelkfoje la akvo estas malpura, kaj – ve – estas glueca la man'.

Solvo

Prilumis vi la temon brile, malavare.
Estingu „lampon", ĉar ni ŝatus vidi klare.

Lingvaj rimarkoj

eĉ ne malmultaj, venis nuntempe al nia redakcio, okaze de nia respondo al Stanislaw *Pietrzak* (vd. HV 78/1. p. 38.), kiu lanĉis proponojn por malŝarĝi la prepozicion DE. Kelkaj aprobas liajn proponojn por malŝarĝi la prepozicion DE. Kelkaj aprobas liajn proponojn, aliaj ne, aŭ nur la ideon, almenaŭ parte; la opinioj tre diverĝas, kiel kelkaj ekzemploj montros.

Inĝ. Jan *Werner* (ĈS, Brno) opinias apenaŭ akcepteblaj la proponojn de S.P., sed prezentas anstataŭ DISDE, FOR DE novisman prepozicion AB (tiri hundon de Petro ab la domo). Tiun kazon alimaniere (tiri hundon de Petro de la domon) esprimas Miroslav *Malovec* (same el Brno), kiu cetere rifuzas novajn prepoziciojn, ĉar per novaj sufiksoj, finaĵoj deziras majstri la problemon. Al ni ŝajnas erara utiligi la direkton (almovon) montrantan -N finaĵon por senco de formovo. Ni konsentas kun PIV (p. 25.): „tiu kontraŭdirus la direktan signifon". En alia propono: roloj de aktoroj = „aktorojes roloj", kaj „tiri Petres hundon de la domon" prezentas sin la tn. ĝermana (angla) genitivo.

Prave mencias Aleksander *Grela* (PL, Nowy Sacz), ke ĝis nun tiurilate nekontentigaj proponoj estis prezentitaj, sekve ili fiaskis ĉe la verkistoj. Pluraj alparolintoj aludas al FAR, kiel kontentiga solvo, ankaŭ kiel precedenco (pri FAR kaj aliaj evit-manieroj vd. PIV p. 167–168.). Lau averto de Adolf *Stanura* (ĈS, Ostrava) ni ripetas, ke la multaj sencoj en DE estas praktike tre malfacile distingeblaj. Troa precizigo nur ĝenas la publikon, malfaciligas eĉ por verkistoj la konceptadon, aliflanke la komprenon, anstataŭ helpon prezenti.

Tion pruvas la konataj fenomenoj ĉe la preciza prepozicio DA, kies funkcio estas ĝuste malŝarĝi iom la prepozicion DE. Tamen multaj uzas DA neĝuste, eĉ ofte anstataŭ DA, estas *erare uzata* – kvazaŭ bazprepozicio – DE. Tiel montriĝas la malfacilaĵoj koncerne la sencodisigojn ĉe DE.

Kvankam eminentuloj de sciencoj, de filozofio ne manifestis tiun DE-problemon pro bezonata precizeco kaj logikeco en siaj tekstoj, ni tamen konsentas, ke ĝi meritas *sciencan esploron* de kompetentuloj. Multaj eminentaj lingvistoj studas nian lingvon; dum la grandsukcesa UK en Varna elstaris la Konferenco pri Esperantologio. *Hungara Vivo* dankas la alparolintoj, tamen kiel unuavice literatura kaj arta revuo ni ne havas sufiĉe da spaco por lingvistikaj studoj. Ni transigas tiun ĉi problemon al forumoj de la lingvoscienculoj, al la Akademio de Esperanto.

E. F.

La plej granda teleskopo de la mondo

Depost Galilei strebas astronomoj utiligi pli kaj pli kapablajn teleskopojn por esplori la stelaron. Estas konata fakto, ke per pli grand-diametraj teleskopoj oni povas observi astrojn, kiuj neniel videblas tra malpli grandaj iloj. Ties simpla kaŭzo estas, ke teleskopoj kolektas des pli multe da lumo pri la celita objekto – dum sama tempo –, ju pli granda estas la lumon kolekta surfaco, t.e. la diametro de teleskopo.

La konataj lenso-teleskopoj jam delonge atingis sian teknikan limon: pli grandajn lensojn, bonkvalitajn, jam ne eblas produkti. La *Yerkes*-teleskopo kun objektivo de 102 cm-a diametro – konstruita fine de la pasinta jarcento – eĉ nun servas kiel la plej granda „refraktoro" de la mondo. De tiam rapide progresis la konkavspegulaj teleskopoj – inventitaj de *Newton* –, kies mezurojn ne baris la ega vitro-amaso, ĉar pere de metala ujo, oni povis relative facile kompensi formo-modifiĝojn kaj dum gisado, kaj dum uzado. Per la reflekta teleskopo de la monto *Wilson* – havanta diametron de 2,54 m – komenciĝis efektive la astronomio de *ekstragalaksioj*, plej foraj stelaroj.

Post la dua mondmilito en Kalifornio oni starigis gigantan spegul-teleskopon sur la Monto *Palomar* kun diametro de 508 cm, kaj ĝi restis dum tri jardekoj rekordo. Gravegaj malkovroj de la moderna astronomio estis dankindaj al tiu gigaso de la optiko. Antaŭ tri jaroj, la 7-an de novembro 1975 estis ekuzita sur *Nord-Kaŭkaza monto* la ĝis nun plej granda teleskopo: ĝia grandega ĉefa spegulo havas *diametron de 6 metroj!* Tiu mezuro ebligas al ĝi kolekti 50%-jn pli da lumo ol la Palomar-teleskopo; memkompreneble, ankaŭ ĝia pezo estas multe pli granda: 42 tunoj, kiu bezonas ujon (aŭ nomu ĝin kadro) de 48 tunoj. Por teni kaj movi tiun ĉi faciletan ludilon, la kompleta teleskopo ampleksas pli ol duonmil tunojn. Inter la ekstremaj problemoj de ĝia starigo – pro vidpunktoj de precizeco, stabileco ĉe tia ega volumeno – ni mencias, ke rullagro ne estis aplikebla inter tiaj cirkonstancoj; la solvo plenumiĝis pere de oleofolietoj premitaj inter la tre fajne ĉizitaj metalsurfacoj, tn. hidrostatikaj lagroj.

Specialan solvon bezonis ankaŭ la regulenda temperaturo. La grandega aparato kompreneble troviĝas en halo, kies temperaturo estas precize reguligita – je la atendebla grado de la *venonta nokto*, kiam ĝi estos elmetita al la Kaŭkaza montara aero por observi la plej malproksimajn galaksiojn de la Universo.

La fabrikanto, la Leningrada Optika-Mekanika Trusto aldonis al la giganta teleskopo multajn specifajn help-aparatojn por astrofizikaj esploradoj. Tuta sistemo de komputiloj aliĝas por direkti la instrumentaron, kaj post la observadoj, komputi, kolekti, registri kaj prilabori la amason da indikoj, kiuj ĉiumomente perceptiĝas pere de la ega kapacito de la astronomia giganto. Estas certe, ke la scienco ricevos aron da respondoj al multaj, ĝis nun ne solvitaj problemoj de la Universo.

Princo Filipo dum la maratona konkuro

La venkintoj de la teama kategorio:
1-a Hungario, 2-a Germana Federacio Respubliko,
3-a Pollando

Mondĉampiona konkurado de kvarĉevalaj ĉaristoj

Unika evento okazis dum la 25–26–27-an de aŭgusto 1978 en Hungario.

I.F.Ĉ.S. (Internacia Federacio de Ĉeval-Sportistoj) en la hungarlanda urbo Kecskemét aranĝis la 4-an Mondĉampion-Konkuradon de kvarĉevalaj ĉaristoj. Tiu evento vekis grandan interesiĝon flanke de la ĉevalsport-ŝatantoj en multaj landoj de Eŭropo, samtiel ankaŭ en Hungario. Loĝantaro de la urbo Kecskemét duobliĝis dum la tagoj de la konkurado. Pli ol centmil spektantoj rigardis kun vigla atento la turnirojn kaj plezuriĝis pri la belegaj ĉevaloj.

Estis komprenebla la amasa interesiĝo, nome ĉeestis ankaŭ Filipo, princo de Edinburgo, edzo de la brita reĝino. Li estas prezidanto de I.F.Ĉ.S. kaj li mem – kiel membro de la brita teamo – partoprenis la konkuradon. La ĉaro kune kun la kvar belaj ĉevaloj, kondukitaj far de Princo Filipo, estas posedaĵo de la reĝino.

38 konkurintoj (kun siaj 152 ĉevaloj) reprezentantoj de dekdu eŭropaj landoj – dum la tritaga konkurado – prezentis sian majstrecon kaj strebis rikolti rezultojn. 180 ĵurnalistoj, radiokaj TV-reporteroj alvenintaj el pluraj eŭropaj landoj, donis ĉiutage detalajn informoĵn pri la konkurado.

I.F.C.S. celas – pere de la organizo de tiuj konkuradoj – restarigi en modernaj formoj la malnovajn tradiciojn de similaj konkuroj ŝatitaj kaj kultivitaj jam dum la romia epoko (kvadriga konkuro). Kaj kiel la faktoj pruvas, tiu celo efektiviĝas de jaro al jaro. Al tio efike kontribuas la aktivado de la hungaraj kvarĉevalaj ĉaristoj, kiuj dum la antaŭaj internaciaj – mond- kaj Eŭropaj – konkuroj rolis elstare, gajnis la plej multajn orajn kaj arĝentajn medalojn. Tiel okazis ankaŭ ĉijare: György BÁRDOS, Sándor FÜLÖP, Ferenc MUITY kaj József PAPP gajnis denove la unuajn premiojn kaj en la solula, kaj en la teama kategorio. Pri ili, pri iliaj sukcesoj la hungaraj ĉevalsport-favorantoj povas esti fieraj.

Probable la legantoĵn interesas kiel okazas tia konkurado. Ĝi konsistas el 3 turniroj. Dum la malferma solenaĵo, kien alviciĝas – fronte kun la surĉevala blovorkestro – la konkurantoj kune kun siaj ĉaro kaj „laborkunuloj" – jes, la kvar ĉevaloj estas laborkunuloj por la ĉaristoj! Poste komenciĝas la konkuro. La ĉaristo sidanta sur la ĉaro, devas konduki siajn ĉevalojn – en ne rapida kuro – sur preskribita linio. Intertempe la ĉaristo devas fari la direktadon dum unu minuto per u n u m a n o. Kvinmembra internacia ĵurio taksas la prezentaĵon. Kiu dum la plej mallonga tempo kaj kun plej malmultaj eraroj trakuras la indikitan vojon, tiu gajnas la unua-tagan konkuron. Tio okazas sur limigita – 110 × 50 m-jn granda – teritorio.

Dum la dua tago okazas la t.n. „maratona konkuro". La ĉaristoj devas konduki siajn ĉevalojn sur 33 km-jn longa vojo tra arbara kaj sabla teritorio. Survoje starigitaj diversaj baraĵoj, eĉ lageto malfaciligas la konkuron. Same kiel la antaŭan tagon, okazas ankaŭ ĉi tie la ĵuriado.

La trian tagon la konkuro daŭras sur la sama teritorio, kie dum la unua tago. Ĉifoje la ĉaristoj kondukas siajn ĉevalojn inter 15 diversaj baraĵoj tra la t.n. „pordegoj", kiuj estas 40 cm-jn pli larĝaj ol la malantaŭa akso de la ĉaro. La ĵurio post la taksado, baze de la tri-tagaj rezultoj, konstatas la finan rezulton, starigas la vicordon de la venkintoj.

La venkintoj premiitaj per ora, arĝenta kaj bronza medaloj, estas prezentataj al la publiko dum la ferma solenaĵo. La granda sukceso de la hungaraj kvarĉevalaj ĉaristoj elvokis sinceran rekonon kaj vastan ĉinon flanke de la ĉevalsport-favorantoj en tuta Eŭropo.

Lajos *Kapitány*

Ankoraŭfoje pri la reĝedzino

En la n-ro 1978/3 de HV (p. 102–103) aperis diskuto pri arkaigita traduko far O. Haszpra (G. Heltai: La enfermita reĝedzino. HV 1977/5). Post la ekpresigo de tiu numero atingis nin interesa alparolo el Ĉeĥoslovakio, kaj post ĝia apero ankaŭ ĝustigo pro miskompostado. Nun ni aperigas tiujn du kontribuaĵojn, kaj per tio ni konsideras la diskuton fermita.

Literatura frandaĵo

Estimata Redaktoro!

Mi legis la kritikon de Sándor Révész *Esperanto arkaika: Esperanto konfuzita.* Ĉar mi trovas la opiniojn de Révész iom ne ĝustaj, mi permesis al mi surpaperigi kelkajn miajn kontraŭopiniojn.

Mi konscias, ke ni diskutas ne la plej interesan flankon de la teksto. Verŝajne pli indus analizi la stilon de Haszpra sur la plano de vorto kaj frazo. Ekz.: rilatoj al Biblia stilo, uzo de -end, artefaritaj arkaismoj (tujbaldáŭe, tiun ĉi mi ekamis), ktp.

Haszpra faris iom kuraĝan eksperimenton malfaciligante al si la jam sen tio ne facilan taskon de traduko de ne nuntempa aŭtoro per la pretendo transkodigi en Esperanton ne nur la pli altajn planojn de la teksto (temo, ĝenro, frazo, vorto) sed ankaŭ la pluajn. Li ne haltas kaj klopodas transkodigi la originalon eĉ sur la plano de morfemo, fonemo kaj grafemo. Tia ĉi strebado ne estas vaste kutima, tamen aksiome ne ekskludebla.

La incitita reago de Révész estas preskaŭ komplete maltrafa kaj erara. Sur kio li apogas siajn ekskluzive negativajn aŭtoritatajn asertojn? Se li pravus, kiel do mi povus ĝui la legon kaj enhave kaj stile. Kaj mi scias, ke la ĝuon de la arkaika aromo konsistigis ankaŭ la emocioj rezultigitaj de la ortografiaj, gramatikaj kaj stilaj „kripligoj". Tio signifas, ke la rimedoj elektitaj de Haszpra efikas (almenaŭ por ĉeĥoj kaj slovakoj).

Tian aliron al traduko, kiun elektis Haszpra, kritikistoj ja pripolemikas, tamen traduk**teorio** ne rifuzas ĝin[1]. Ankaŭ traduka praktiko en naciaj literaturoj liveras ekzemplojn de tradukoj eĉ ortografie arkaikigitaj[2].

Popovič[1] diras, ke „en la kazo se tradukanto tradukas ne samtempan aŭtoron, li trovas sin en simila situacio kaj antaŭ similaj taskoj kiel aŭtoro de historia ĝenro. Tiam oni kutime aktualigas, ĝeneraligas la pasintaĵojn, alirebligas ĝin al la samtempulo. Historiumado (arkaikigado) estas pravigebla nur tiam, kiam historiumas la aŭtoro, en alia kazo ĝi estas klarigebla kiel intenca ago de la tradukisto. Dum originalo aperas kiel unufoja, unika, neripetebla, traduko de kia ajn alilingva verko havas ĉiam karakteron de eldiro, kiu estas unu el la ebloj. Esenca trajto de traduko estas ĝia multobleco, ripetebleco."

Haszpra do faris unu traduktekston el senfina eblo-aro.

Por juĝi liajn tradukrimedojn ne gravas, ke li devis artefari, ĉar li ne disponis aŭtentikan stilan analogiaĵon. Gravas la efiko, do funkciado, de la artefekto. Laŭ tiu oni juĝu. La tradukintenco de Haszpra estas transdoni al nuntempa leganto Esperanta tiujn efikojn, kiuj emociigas nuntempan Hungaran leganton de la originala teksto, speciale li volis transdoni la apartan ĉarman aromon de arkaikaj tekstoj. Tiel li celkonscie prilaboris ĉiujn tekstoplanojn. Lia eksperimento povas impresi eble neserioze, petole, lude, sed tio ja plene kongruas kun la enhavo de la rakonto kaj nur substrekas ĝian petolan ĉarmon.

Révész sendube konsentos, ke la grafika aspekto estas unu el la konsistaĵoj de teksto. Ĝia signifo povas esti diversgrade grava en la komunika kodo inter aŭtoro kaj leganto. (Rememoru la versojn de Majakovskij.) La informportan kvaliton de la grafika aspekto (estetikaj, tempaj kaj aliaj valoroj) povas ja utiligi ankaŭ tradukanto.

La ŝanĝoj de normala Esperanto ne estas enkondukitaj de Haszpra arbitre – estas ĝenerala evolutendenco de skriboj, ke ili simpliĝas. Révész pruvu la malon. Tial la unua duono de ŝanĝoj, la komplikigita ortografio, elvokas nature la impreson de malpli nova stato de skribo, kaj sekve impreson pri historieco de la teksto-ekesto. La dua duono de ŝanĝoj koncernanta gramatikon, estas verŝajne komprenata de hungaroj en alia grado ol de ne-hungaroj, sed ĝi ja signifas ion ankaŭ por ili. La verboformojn -uss ne ĉiu alilingvano sentos kiel konjunktivo, ĉar almenaŭ slavoj tute ne havas ideon kio estas konjunktivo (tiu gramatika kategorio ne ekzistas en slavaj lingvoj), sed laŭ kunteksto ni komprenas ilin kiel -is. Mi sentas samtempe, ke estis iam ia verboformo (aŭ kategorio), kun dio scias kia preciza signifo, al mi do nun ne precize konata, sed ne ĝenanta sufiĉan komprenon de la ideoj. Kaj ĝuste tiu ĉi eta svageco kaj ioma penigo estas sendube unu el la kvalitoj de la rilato inter nesamtempaj aŭtoro kaj leganto. Do oni ja sentas malnovecon de la esprimo.

Tute maltrafas Révész asertante, ke Esperanto ne havis kaj neniam povos havi historiajn statojn. Li do kontestas evoluon de Esperanto? Li bonvolu studi la unuajn tekstojn en Esperanto, ekz. tiujn de Einstein[3], sed ankaŭ de Zamenhof, kie eblas trovi arkaikaĵojn. Sed Haszpra ne uzis la naturan malnovecan lingvon, male, lia lingvaĵo estas ĉe tiu vidpunkto moderna. Liaj malnovigaj rimedoj estas artefaritaj. Ĉu li faris bone? Mi jen provos pravigi lin.

En la komunikad-procedo estas nedisigebla la duopo aŭtoro – leganto. Ĉe perceptado de verko fare de leganto tre gravas lia literatur-historia konscio. Kun tiu nepre la aŭtoro aŭ tradukisto devas kalkuli. Do en nia kazo kun la socia konscio pri la historio de Esperanta literaturo kaj lingvo. Sed ĉe Esperantistaj legantoj, pro subjektivaj kaj objektivaj kaŭzoj, la literatura-historia fono apenaŭ ekzistas en sufiĉe reliefa grado, tiel ke eblus utiligi ĝin por la tradukintenco de Haszpra. Tial restis nur la ebleco artefare sekvi modelojn de naciaj lingvoj, t.e. apogi sin al nacikultura historia konscio, al tio, kompreneble, kio estas en ĝi pli aŭ malpli universala. Haszpra eliris el la hungara modelo, sed ja konscie strebis apliki ĝenerale validajn leĝojn. La trafoj estas akceptindaj kiel riĉigo de Esperanta belliteratura traduk-ilaro. Kiuj estas tiuj trafoj, tion juĝu vasta internacia legantaro. Mi provis montri kelkajn.

Miaopinie Haszpra elektis ĝustamezure la arkaikigajn rimedojn. La teksto estas legebla sen ia ajn speciala lerno de arkaika Esperanto, kiel necesas ĉe tiu de Halvelik. La ortografia kaj iom gramatika kripligo de Esperanto donas ĝuste tiun penon, kiu necesas ĉe lego de (ja legeblaj) historiaĵoj kaj donas la apartan guston, kiun ĝuas leganto, frandemulo, ĉe iuj malnovaj tekstoj.

Mi devas danki al Haszpra kaj al Hungara Vivo por rara literatura frandaĵo, por ekkono de plua kaj nova faceto de hungara literaturo.

Aleš BEDNAŘÍK Bratislava

[1] Anton Popovič: Teória umeleckého prekladu (Teorio de arta traduko), TATRAN, 1975

[2] En la slovaka ekzemple Nacia artisto Sán Smrek tiel tradukis en 1949 la baladojn de François Villon.

[3] D. Gregor: La fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto. Scienca Revuo 2/3, 1974 kaj 5/6, 1977.

[4] Halvelik: Arkaika Esperanto, 1969.

Ne mi konfuzis

Kelkaj malĝustaĵoj kompostistaj ŝajnigis la kapon de la skribinto de la artikolo „Esperanto arkaika – Esperanto konfuzita" . . . konfuzita.

Jen la unua eraro: post la skizado de la unua kritikindaĵo legeblas: „*Jen la dua eraro* de la tradukinto". Trankviliĝu tiuj, kiuj vane serĉis la unuan! La duan alineon *mi* komencis samkiel en la jena artikoleto.

La sekva: mi ne konsentas kun la kompostisto, ke „la lud-traduko de la Primorta Prediko . . . de Kalocsay estas interesa kaj komprenebla *ankaŭ al nehungaroj*". Atentante mian argumentadon diveneblas, ke laŭ mia opinio ankaŭ ĝi estas interesa kaj komprenebla *inkluzive al hungaroj*.

El la kvina frazo de la antaŭlasta alineo nur unu vorto, unu „ekzemple" forlasitis, sed tio jam sufiĉas, ke la leganto ne komprenu, kiel entemiĝis la *dekoka-jarcenta* angla kaj hungara lingvoj.

Fine: estas fakte, ke „*ne ĉiuj scias*, ke Esperanto havas tiajn lingvajn eblojn, kiuj mankas en ĉiuj aliaj lingvoj". Tamen – pensante pri esperantistoj revulegantaj – mi skribis, ke „*ni ĉiuj scias* . . ." Tion. Espereble mi ne eraris.

S. *Révész*



La bildoj de Endre Bálint



Li estas jam delonge konata en Hungario kaj en multaj Eŭropaj landoj kiel eksterordinara pentristo, kiel majstro de la moderna stilo. Jam komence de sia kariero li aliĝis al la plej nova arta tendenco. Sendube havis grandan rolon al liaj unuaj jaroj la neforgesebla amiko, grandtalenta pentristo, Lajos *Vajda*.

Ili kelkaj fondis la „Eŭropan skolon" (1945–1948). La „Pariza periodo" (1957–1962) estas eble la plej signifa epoko en lia evoluo.

Lia tuta laboro (pentraĵoj, grafikaĵoj, kolaĵoj) estas eksterordinara pro tio, ĉar ĝi estas mondo de la memoroj, kaj ankaŭ nekutimaj, ĉar li pentris nur la fragmentojn, eĉ multfoje la rompopecojn de la memoroj.

Por tiuj, kiuj haltis je la 19-a jarcenta pentrarto, ne estas facile kompreni, akcepti la mondon de Endre Bálint. Sed estas tre grava motivo, neforgesebla fakto, ke li estas filo de la 20-a jarcento (naskiĝis en 1914). Do, kiel multaj artistoj en ĉiuj brancoj de l' artoj, ankaŭ li kapablis reprodukti la mondon, kiu estis kruela, freneza, pereiga, kiu disrompis la memorojn kaj revojn de la homoj.

Liaj pentraĵoj – videblaj en ĉi tiu paĝo – bone karakterizas lin. „La vagabonda fraŭlo" (1959), „Funebro" (1957). „La mondo de la silento" (1961), apartenas al la plej belaj pecoj de lia arto. Bedaŭrinde sen koloroj la blankaj-nigraj bildoj ne bone redonas la originalajn verkojn.

Mihály Gergely

ESPERANTAJ LIBROJ

Siatempe Zamenhof parolis pri la progresado de la Esperanta libroeldonado, kiel pri indikilo de kompleksa evoluo de la movado. Se lia aserto estis prava, lastatempe ni ne havas kialon plendi: aperas ĉiam pli da novaj libroj. Krom la kvanta progreso oni spertas ankaŭ strukturan pliboniĝon de la novaĵoj. Ŝrumpis la nombro de nebulaj filozofiaĵoj, receptoj por la savo de la homaro, umbilikspektado de sin-gratuloj.

En Hungario dum 1978 eliris entute 11 titoloj kun sama amplekso de 2173 paĝoj. Tiu paĝonombro konsistigas proksimume 15% de la monda jarprodukto. Mi ne faris laŭlandan statistikon, sed tre probable nia lando havus tre elitan lokon en tia vico.

Jen kelkaj ciferoj pri la libroprodukto de la lastaj jaroj. (En la statistiko figuras tiuj verkoj, kiuj dum la koncerna jaro estis anoncitaj en la rubriko *Laste aperis . . .* de *Esperanto*.)

	1975	1977	1978
Nombro de ĉiuj libroj, en kaj pri Esperanto	90	147	131
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj en kaj pri Esperanto	8 928	16 897	14 529
Nombro de ĉiuj libroj en Esperanto	75	111	99
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj en Esperanto	7 311	12 804	11 261
Nombro de originalaj beletraj verkoj	9	12	25
Suma paĝonombro de originalaj beletraj verkoj	946	1 936	3 187
Nombro de tradukitaj beletraj verkoj	14	37	23
Nombro de nefikciaj verkoj	52	62	36
Suma paĝonombro de nefikciaj verkoj	5 339	6 650	4 685
Meza paĝonombro de libroj en Esperanto	99	115	114
Meza prezo de Esperantaj libroj (en nederlandaj guldenoj)	6,–	9,30	9,06

Kiel videble, la produkto de 1978 iomete postrestas al la antaŭjara, sed ĝi grave superas tiun de 1975. Surprize granda estas dum la pasinta jaro la nombro de la originalaj beletraĵoj: eliris 24 libroj kun entute 3187 paĝoj. El tiuj 25 verkoj nur 6 estis represaĵoj, do aperis entute 19 novaj beletraĵoj, originale verkitaj en Esperanto.

Tamen, oni ne forgesu, ke libro fariĝas vera kulturfaktoro nur tiam, kiam ĝi trovas vojon al la legantoj. En internaciaj dimensioj mankas fidindaj indikoj pri kolportado, sed estas tute certe, ke restas ankoraŭ multego farenda sur tiu kampo. (Mi menciu nur la magran librooferton de la giganta UK en Varna.) Staru ĉi tie do nur la jarfina rezulto de la Libroservo de HEA: en Hungario dum la jaro 1978 vendiĝis Esperantaj libroj en valoro de ĉ. 320 000 forintoj. (En tiu sumo la prezo de vortaroj kaj lerniloj konsistigas maksimume 10%.) Ĉar la meza prezo de Esperanta libro estas ĉ. 70 forintoj, hungaraj esperantistoj aĉetis dum la jaro iom pli ol 4500 Esperantajn librojn. La sumo, elspezita por ili, egalas ĉ. 95–100-oblon de la meza monatsalajro en Hungario.

V. *Benczik*

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

En tiu ĉi jaro ni revivigas la malnovan rubrikon de HV: *„Ekzameno sen risko"*.

Per tiu ĉi „ekzameno" oni povas ne nur mezuri sian scion pri la E-literaturo, sed tiuj, kiuj ĝuste solvos la demandojn, kompletigos ankaŭ sian hejman Esperanto-bibliotekon per valora libro.

En la nuna numero la demandoj koncernas la poemaron „Kvaropo" kaj ĝiaj aŭturoj.

1. Ni citas strofon el poemo. Bonvolu alsendi la nomon de la poeto kiu verkis ĝin. Al kiu estas dediĉita tiu ĉi poemo?

Super la polvo de la mondĥaoso
en kor-izolo sidas kantforĝisto;
juvelojn forĝas li sur vivamboso,
el oro de la ĝoj', arĝento de la tristo.

2. Auld malŝatas la filistran moralon kaj ĝiajn tabuojn, tial atentindan rolon en liaj poemoj havas la erotiko. Bonvolu alsendi la titolojn de kelkaj liaj poemoj el la poemaro, kies temo aŭ motivo estas erotiko.

Limdato: unu monato post la ricevo (en Eŭropo) de tiu ĉi numero.

La ĵus forpasinta aŭtoro estis ne nur elstara poeto kaj tradukisto, sed ankaŭ delikatsenta kritikisto. Liaj eseoj pri *Baghy, Kalocsay, Schwartz* kaj aliaj, ne nur prilumas la verkaron de la koncernaj aŭtoroj, sed ankaŭ mem estas agrablaj legaĵoj.

Prezo: 12,- gld.
121 p., 19 cm.
Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio

recenzoj-recenzoj-recenzoj

Epopeo pri ni

LUMO DE ORIENTA EŬROPO. Poemo de Vladimir Beekman. El la estona lingvo tradukis: H. Dresen, J. Ojalo kaj H. Saha. Eldonis: Eesti Raamat, Tallinn, 1978. 48 p., 17 cm. Ilustrita. Prezo por Hungario: 10,– Ft.

Laŭ mia kalkulo tiu ĉi libro estas la sesa, kiun liveris al ni dum la lastaj jaroj la estona ŝtata eldonejo *Eesti Raamat*. Tiu ĉi eldonejo faras laŭdindan kaj sekvindan kulturan mision, liverante al ni librojn plaĉaspektajn kun valora enhavo, eminente tradukitajn, zorge redaktitajn, kaj ĉion ĉi – je modera prezo.

Tiu ĉi longa poemo de Beekman per sia enhavo kvazaŭ postulis tradukon al Esperanto. Ĝi prikantas la historion de la teritorio *De Finna golf' ĝis turka limo* . . . – tiun de Orienta Europo.

La poemo konsistas el *Enkonduko, Epilogo* kaj kvin ĉapitroj. La centra problemo de la poemaro estas la teruraĵoj de la dua mondmilito: ne mirinde, ja la poeto mem jam infanaĝe spertis tiujn teruraĵojn, restante sola, kaj edukiĝonte en infanhejmo. Tamen, tiujn teruraĵojn li ne priskribas en maniero rekta, iom trouzita fare de la lavango de primilitaj verkoj. Beekman scias trafiltri siajn memoraĵojn, sintezi ilin kun siaj konoj, kaj prezenti siajn sentojn kaj pensojn en densa, fortefika maniero.

En la ĉapitro *Lingvo de kamentubo* aperas pluraj aludoj al Zamenhof, *„malgranda juda kuracisto kaj granda idealisto"* kaj Esperanto. Li turnas sin al Zamenhof, alludante pri kamentuboj de koncentrejoj:

Pardonu min, bona doktoro Zamenhof,
ne havis mi tempon por lerni Esperanton.
Mi devis gardostari
en ĉiuj marĉoj, montaroj, arbaroj,
por ke ree blankiĝu la nigra vintro.
Kaj nun mi parolas de Finna golf'
ĝis turka limo
lingvon, kiun instruis al mi tiu kamentubo

La lasta ĉapitro – *Koroj* – prikantas Hungarion. Beekman majstre kaj aŭtentike priverkas la ĉi-jarcentan historion hungaran: la jubilon post 1945, la mornon kaj angoron de la kvindekaj jaroj (personkulto), la kontraŭrevolucion de la jaro 1956.

La verko de Beekman estas majstraĵo. *Ĝin devas nepre legi ĉiu esperantisto en Meza kaj Orienta Eŭropo.* Per lingvaĵo simpla, ofte publicisteca li kapablas peri al la leganto pensojn komplikajn kaj profundajn en arta maniero. Apartan laŭdon meritas la lertega konstruo, kiu mem multe kontribuas al la efiko de la tuto. Sed la plej elstara eco de la poemo tamen estas la kerna penso pri la komuneco de homa sorto en Orienta Eŭropo, trans ĉiuj landlimoj.

La tradukintoj tre bone plenumis sian ŝajne simplan, sed fakte malfacilan taskon.

V. *Benczik*

Danto kaj Beatrica revivigitaj

Trygve Müller: LA AMO DE DANTO ALIGHIERI. Originala dramo en kvin aktoj. Eld. Plejado, Ascoli Piceno, 1978. 116 p. 20 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

Politiko kaj amo, gelfoj kaj gibelinoj, la grandioza poeto kaj sia inspiranta Beatrica interludas rapidkurajn scenojn en ĉi tiu dramforma romano. Estas merito de la aŭdaca verkisto, kiu prenis ĉi tiun formon tiel maloftan en la Esperanta literaturo, ankaŭ lia bona historia kono, per kiu li vivigas antaŭ ni la por ni jam tre-tre fremdan, mezepokan, moviĝeman Florencon. Kompreneble la personaĵoj, kun ne moviĝemaj karakteroj kirlas la teatran komplikadon, kaj ilustras siaparte la agojn kaj kontraŭagojn ĉirkaŭ Danto, centro de la eventoj kaj de la paroltemoj. Müller paroligis siajn figurojn kun elokvento, kia povis ekzisti en tiu altkulturita urbo verŝajne nur laŭ imagoj de postaj jarcentoj, sed ĝuste en la drama formo, ni akceptas tiun klasikecan manieron el buŝo de tiuj erudiciuloj. Malproksime certe de la nuntempa teatra parolstilo, la leganto, havanta senton por historiaj romanoj, baldaŭ alkutimiĝas al tiu „alta stilo", kaj kapablas sekvi kun intereso la ofte ekscitajn, foje konfese meditemajn scenojn. Mi rapide aldonas, ke la stilo, frazkonstruo restas nekomplikaj, lingve ili estas bone digesteblaj por la leganto.

Mem *Beatrica* aperas kiel tre prudenta, altmorale pensanta fraŭlino kun troa spirita amo, kiel decas al la *Damo* de la ĉielaj sferoj de la Dia Komedio. Mi volonte estus leginta foj-foje versojn el la Komedio, aludantajn al ŝia konduto, „anticipantajn" la admirindan omaĝon de la poeto, kiam li vagadas jam al la „suproj", alten tirata de siaj virtoj. Kvankam mi atendis ankaŭ citaĵojn el liaj politikaj prijuĝoj pri aferoj kiuj prezentas sin en la teatraĵo, tamen mi emas akcepti, ke Müller evitis tiun ege riskan eksperimenton, enigi proprajn vortojn de Danto. Ankaŭ tiel la libro estas rekomendebla, plezuriga legaĵo.

Ervin *Fenyvesi*

Originala verkado en Japanio

JAPANA VARIACIO. Originala antologio. Kompilis: Miyamoto masao kaj Ueyama masao. Eldonis: L'Omnibuso (Kioto), 1978. 139 p., 19 cm. Prezo neindikita.

Antaŭ dek kvar jaroj japanaj esperantistaj aŭtoroj la unuan fojon anoncis sin antologie: tio okazis en la jaro 1965 per la verko *Japana kvodlibeto,* kiu enhavis verkojn de naŭ poetoj kaj naŭ prozistoj. La intenseco de la kultura aktivado en Japanio plene motivas eldonon de nova antologio, ebliganta superrigardon pri la stato de la internacilingva literatura kulturo en tiu fora lando.

Tiu ĉi antologio prezentas al ni verkojn de dudek unu aŭtoroj (inkluzivante la membrojn de la Hajkista Klubo). Kelkaj el ili – Miyamoto, Ueyama, Konisi – estas vaste konataj internacie, aliaj nur lastatempe aperis antaŭ la internacia publiko (Oka, Yagi-Nihei), kaj kompreneble troviĝas ankaŭ nomoj, kiuj estas nekonataj por la meze esperantista leganto ekster Japanio.

Tiu ĉi „variacio" montras grandan variecon. En la volumo alternas beletraj prozaĵoj (ne ĉiam noveloj), poemoj, eseoj. Troviĝas pecoj vaste konataj, kiel *Kantas vjetnama patrino* de Ueyama (parto de la repertuaro de Ĝanfranko) aŭ *La subtera elizeo* de Konisi (tradukita al la pola kaj hungara lingvoj; hungarlingve presita en 70.000 ekz.), kaj ankaŭ verkoj, kiujn povis legi ĝis nun nur la abonantoj de *La Revuo Orienta* aŭ *L'Omnibuso.*

Malfacilas reliefigi iujn el la verkoj sen perdi objektivecon. Ofte okazas ankaŭ, ke iu verko en sia tuteco efikas ne tre konvinke, tamen ĝi enhavas belegajn fragmentojn. Tia por mi estis la sekva penso en la kontribuaĵo de Isobe: *„Senlima pesimismo atakas min ĉiam, kiam mi pripensas, ke ni homoj vivas en tia mondo, kie eĉ amantoj de la sama kanto devas mortigi unu la alian."*

Tiu ĉi antologio estas nepre leginda por ĉiu esperantisto, kiu jam liberiĝis disde la misideo, ke la esperanta literaturo kreiĝas nur en Eŭropo.

V. *Benczik*

recenzoj-recenzoj-recenzoj

Nova poeto el Japanio

LAZUR' KRISTALA KAJ PLUV' SUSURA. Utaaro de Masayuki Kuroda. Sen indiko de eldonloko, 1978. 117 p., 19 cm. Prezo: 10,50 ned. gld. (Por Hungario: 70,– Ft.)

Kiel aŭtoro de originalaj esperantaj verkoj dum longa tempo en Japanio agadis fakte nur Miyamoto masao. Sed iom post iom la rondo vastiĝis: aperis Ueyama masao kun novelaroj kaj poemaro, poste Yagi-Nihei kun specialaroma prozaĵo, kaj jen, nova japana esperantista poeto anoncas sin kun poemaro.

La nomo de Kuroda ne estas tute nova por la literatura publiko: li estas plurfoja gajninto en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj en aliaj konkursoj. Tamen, nur nun ni havas eblon por superrigardo pri lia arto.

La poemaro enhavas tridek tri originalajn poemojn kaj dek du tradukaĵojn el la japana, plejparte el klasikaĵoj.

La originala poezio de Kuroda nutriĝas okulfrape el la japana tradicio. Ne temas nur pri la formo – ja la subtitolo „utaaro" evidentigas tion – sed ankaŭ pri la tono kaj enhavo. Spiras el liaj verkoj la orienta meditemo, la silenta kontemplado de la – socia kaj natura – realo.

Kleraj esperantistoj jam lernis ĝui tiun sordinitan poezian tonon, en kies profundo ĉiam kaŝas sin fortaj emocioj, nur tiuj ne trudas sin rekte en la atenton de la leganto. Pro tio verŝajne ankaŭ la utaoj de Kuroda trovos plaĉon ĉe la legantoj.

Tamen, tiuj ĉi utaoj ne ĉiurilate estas senriproĉaj. Ofte ĝenas troa konkretigo, personigo de la atmosfero. Ekzemple:

Sur freŝfoliojn
transfluas aroma briz'
orajn feriojn
mi en ĝarden' pasigis,
vigla ĝerm' min instigis.

Foje li utiligas la esence lirikan formon fakte por simpla rakontado (ekz. en *Japana kongreso en pluvego).*

Tamen, troviĝas tre multaj juvelaj versoj kaj strofoj en tiu ĉi poemaro, eĉ pluraj senmanke belaj poemoj, kiel mem la titoldona *Lazur' kristala kaj pluv' susura.*

Inter la tradukoj impresis min pleje la ĉerpoj el la utaaro de Hitomaro, sed estas ŝatindaj ankaŭ la verkoj de la du aperantaj modernuloj, Yamakawa kaj Saito.

Mi ne dubas, ke la utaaro de Kuroda povos donaci belajn horojn al la esperantistaj poeziamantoj.

V. *Benczik*

Infanoj ĉie la samaj

Ferenc Molnár: LA KNABOJ DE PAŬLOSTRATO. Tradukita de The Esperanto Publishing Co., Aŭstralio. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 19 cm, p. Prezo: 13,80 ned. gld.

Ricevinte la libron por recenzi, mi hezitis dum kelkaj tagoj: ĉu rajtas tion fari mi, maljunulo, recenzi por-junularan romanon? Finfine mi decidis, ke mi devas ĝin provi – do, dirite-farite. Mi komencis legi la verkon, kaj baldaŭ mi enprofundiĝis en la interesan romanon pri la 10–12 jaraj knaboj, loĝintaj en fora lando, eble tiutempe, kiam mi estis samaĝa, tamen vivinta en tute aliaj cirkonstancoj, en lando kun tute mala sociordo. Sed knaboj ĉiam kaj ĉie estas la samaj en la tuta mondo . . .

La tajdo de rememoroj superverŝis, inundis min, el mia junaĝo, kiam mi loĝis en Kievo ĉe la bierfarbriko en la strato Ĵiljanskaja. Ankaŭ tie, en la granda korto, estis subĉiela deponejo de brulŝtipoj, kube kunmetitaj, kaj same, kiel sur la grundo de Paŭlo-strato, ili formis multajn stratetojn. Ni, infanoj de laboristoj kaj oficistoj de la bierfabriko, ludis tie teame. Tamen diferences de la Paŭlo-strato, ni ne havis antagonisman teamon, sed formis „partizanan" taĉmenton, batalante kontraŭ la imagataj „kontraŭrevoluciaj bandoj", kaj „fremdlandaj okupantoj". Ni sieĝis la malamikajn citadelojn kaj defendis la niajn, por kio bone servis la brulŝtipaj kuboj. Kaj ankaŭ inter ni troviĝis prudenta kaj saĝa Boka, sinoferema Nemecsek, fajfanta Csónakos, ĉiam kverelantaj Kolnay kaj Barabás, ankaŭ Geréb. Ne gravas, ke ĉe ni ili nomiĝis Petja kaj Vanja, Senja kaj Fedja . . . Ili estis plene similaj al la knaboj de Paŭlo-strato, same honestaj kaj noblaj, kuraĝaj kaj helpemaj, same malamantaj ĉion, kio estas ligita kun perfido kaj maljusteco.

Mi sentas, ke vi volas min demandi, pri la recenzo: kie ĝi estas? Fakte, la recenzo, en la kutima formo, forestas. Sed: se vi estas junuloj legu la romanon de Ferenc Molnár, ĉar ĝi estas verkita pri vi kaj por vi. Se vi estas mezaĝulo aŭ maljuna, same legu la libron, ĉar ĝi revenigos vin en vian junecon. Ĝuu la enhavon kaj la lingvaĵon (Zamenhofan Esperanton!); samtempe ne forgesu danki al la hungaraj esperantistoj, kiuj reeldonis la verkon de la talenta verkisto.

Petro *Polišĉuk*

Originalliteratura legolibro

La kato en la sako. Legolibro. Elektis kaj redaktis V. Benczik. Tankönyvkiadó (Budapest), 1978. 133 p., 15 cm. Prezo por Hungario: 6,– forintoj.

La infana literaturo en Esperanto havis bonajn tradiciojn jam ĉe la apero de Internacia Lingvo. Unu el la grandaj figuroj de Esperanto-movado, Kazimierz Bein ankoraŭ en 1906 eldonis „Elektitaj-n Fabeloj-n" de Grimm, kvazaŭ antaŭvidante la plej malgrandajn kaj denaskajn esperantistojn. Por tiu ĉi celo li tradukis ankaŭ multajn facilajn novelojn de Reymont, Orzeszko, Ĉirikov k.a. sed bedaŭrinde nun multaj Esperantoaŭtoroj verŝajne pensas, ke la literaturo por infanoj ne estas serioza literaturo kaj eble tial tre malofte aperas infanaj libroj en Esperanto. Tial specialan atenton meritas tiuj aŭtoroj kiuj nun dediĉas sian talenton al infana Esperanto-literaturo.

Antaŭ nelonge la hungara „Lernolibra eldonejo" – Budapest eldonis etan Esperanto-kolekton kun originalaj rakontoj kaj poemoj sub titolo *„La kato en la sako"*. Kolektis kaj redaktis ĝin Vilmos *Benczik*. Post *„Ŝercoj, rakontoj"* ĝi estas dua Esperanto-libro, kiu aperas en la libroserio „Fremdlingva malgranda biblioteko".

Benczik celis ne nur doni taŭgajn legaĵojn por la junaj esperantistoj, sed *antaŭ ĉio konatigi ilin kun la plej talentaj Esperantaj aŭtoroj;* Auld, Boulton, Dinwoodie, Hohlov, Szathmári k.a.

Por ĉiuj, kiuj nun komencas lerni la Internacian Lingvon „La kato en la sako" malfermas malgrandan fenestron al la mirinda mondo de Esperanto-literaturo. La elektitaj legaĵoj estas diverstemaj, mallongaj kaj vekas la intereson kaj emocian pensadon de la legantoj.

La redaktinto ne forgesis ankaŭ doni je la fino de libro ankaŭ koncizajn bibliografiajn notojn pri la aŭtoroj.

Georgi *Mihalkov*

FINNA KLASIKAĴO

LA KANTO PRI LA FAJR-RUĜA FLORO. Romano de Johannes Linnankoski. El la finna lingvo tradukis E. Kuoppala kaj J. Jäntti. Eldonis: Finna Esperanto-Librejo, Kuopio, 1978. 131 p., 24 cm. Prezo: 16,– ned. gld. (Por Hungario: 120,– Ft.)

La nomo de Linnankoski ne estas malkonata por la esperantista legantaro: lia verko *La batalo pri la domo de Heikkilä** aperis jam antaŭ preskaŭ sesdek jaroj en Esperanto (ĝin tradukis V. Setälä). Nun aperas tiu ĉi romano fakte mondkonata, kaj certe ĝi trovos multajn ŝatantojn inter esperantistoj.

Tiom pli, ĉar temas pri verko ne nur majstra, sed ankaŭ ekscite interesa. La rilato inter viro kaj virinoj (tiel!) ĉiam tiklas la fantazion de la legantoj: Donĵuano ne hazarde restas unu el la plej temprezistaj figuroj de la kulturhistorio.

Tamen, ne pensu pri speco de priseksa verko. Linnankoski superbe majstras la rakontan arton, kaj la aventurojn li prezentas al ni simple, sincere sed tute malkrude, ofte en lingvaĵo admirinde bela, poezieca.

La traduko sukcese rekreas tiun ĉarmon kaj mildecon en Esperanto. Nia tradukita prozo riĉiĝis per impona verko.

V. *Benczik*

*Aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 0,90 gld., ĉe la libroservo de HEA kontraŭ 12,– Ft.

ADMONO

En nia nuna krucenigmo ni citas el la poemo de granda hungara poeto Endre Ady. Ensendi sufiĉas nur la horizontalan 7. kaj vertikalan 10. vicojn. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. (Adreso: Redakcio de Hungara Vivo, Budapest, Pf. 193., H–1368)

HORIZONTALE: 1. Gardu la malnovajn dukomentojn! 7. *La unua parto de la kaŝfrazo* 10. Ĉizi vortojn sur pokalo 11. Egipta kaj hispana aŭtomobiloj 12. Kultas 13. Grupo de muzikistoj 14. Cementa konstruaĵo por konservi grenon (R) 15. Aplaŭdejo (R) 16. Finaĵoj de substantivo kaj infinitivo 18. Elektra informsendilo (R) 20. Decidua arbedo (R) 22. Elektrontubo (R) 23. Najli 25. Ĉefurbo de Norvegujo (–o) 26. Ŝafblekado 27. Zorgeme prilabori versojn 29. Antaŭprepari manĝaĵon por kuiri ĝin (R) 31. Parto de oni (!) 32. Karbo, nitrogeno kaj kalio 34. Gago (R) 35. Ceramikistino hungara (TEVAN) 37. Malvira 38. Sortimento de kusenoj (R) 41. OG 42. Palpharego de kelkaj insektoj (R) 43. Malkuraĝi (R) 45. Komence de sciencaj vortoj: nazo (grekdevena vorto) 46. Vi duope kaj mi 48. Malmagra (R) 49. Ĉu etan? Male! *VERTIKALE:* 2. Du rumanaj plus unu germana aŭtomobiloj 3. Konfuzo (R) 4. Artefarita ŝtatlingvo (R) 5. Fianĉina vizaĝvestaĵo, sed malgranda (–o) 6. Grandkorpa besto (R) 7. AI 8. Virnomo (–o) 9. Rilata al inflamo de orelo 10. *Dua parto de la kaŝfrazo* 13. Kovras per ŝindoj 15. Diismo (–o) 17. Alia nomo de Trojo (–o) 19. LRO 21. Ofta mallongigo post infinitivo en la vortaro 24. Ofte bruligita materialo dum la diservoj 26. La bazo de la feŭdalismo 28. Bonvenigo (R) 30. Rumana, kamboĝa kaj itala aŭtoj 33. Granda amiko de la lakto (R) 35. Ofta vorto en la keloj 36. Donas manĝaĵon. 39. Kantis 40. Parto de kriinto (!) 44. Tre volonte vestas sin tiel la fraŭlinoj 46. Tre tre 47. Ĉiutaga manĝaĵo (R)



La ĝusta solvo de nia krucenigmo aperinta en la 4a numero 1978 de Hungara Vivo: *Tristaj fabeloj de la gaja homo, La ruĝa diligenco, Kap-al-tere, Sindbad.*
Libropremion gajnis: *Le Puil Jak* (Francio), *Oksana Muraŝko* (Soveta Unio), *Balogh Imre* (Hungario).
La librojn ni sendis.

Imre *Szabó*

Leterkesto

Ĉasovitin M. D., SU, Petrovsk-Zabalkajskij: el tiu malproksima regiono de Siberio, trans la lago Balkaj kaj urbo Ĉita, kie jam dum la unua mondmilito viglis nia movado, venis via admirinde detala kritiko pri HV. Koran dankon meritas via zorgema legado kaj interesemo pri la nuntempa Hungario. Permesu niaflanke mencii, ke malgraŭ la titolo de nia revuo, ni klopodas esti samtempe bona revuo pri la literaturo ankaŭ de nia kara Esperantio. Irante laŭ spuroj de la fama Literatura Mondo ni publikas multspecajn literaturaĵojn aŭ aliajn kontribuaĵojn el la tuta mondo super certa nivelo. Vi atendas *multe pli* da aferoj Hungarlandaj: tamen ni intencas tion fari nur modeste. Ni skribas artikolojn nur pri vere altrangaj informoj, pri mondan interesaĵon enhavantaj aferoj de nia lando, el niaj historio aŭ literaturo; ankaŭ por disponigi lokon kontentige al eksterlanda Esperanta literaturo, k.s. Ni esperas, ke vi tamen ricevadas tra niaj numeroj fidindajn kaj vastajn informojn *ankaŭ* pri nia popolo, pri la nuntempa vivo en Hungario. Bonvolu sendi ankaŭ alifoje viajn kritikojn! Pro lokmanko ni respondas pri aliaj perletere.

Johan W., GFR: eĉ mallonga letero kaŭzas plezuron, se ĝi konsistas el bonaj ideoj, kiel la via pri redaktado. Ĉi tie ni mencias publike nur la konsilon *por la korespondemuloj.* Vi rimarkis, ke en la anoncoj oni ne kutimas skribi pri foto-ŝanĝoj, kvankam la internacia amikeco, la amikiĝo estus tre bone firmigebla per sendado de *fotoj recipreoke.* Ankaŭ ni proponas al la korespondantoj tial, almeti en ĉiuj kovertoj laŭeble bildojn pri si, pri la familio, loĝloko, eventuale pri laborloko kaj propraj distroj. Oni vere pli profunde povas konatiĝi kun la aliulo, se la leteroj estas „ilustrataj".

Budkov P. F., Su-Ĵornovka, *kaj aliaj:* la solvoj de enigmoj en HV estis memkompreneble *ĉiuj* akceptitaj, sendepende de la – foje nerealaj – limdatoj. Kiel vi devis rimarki, en 1978 nia revuo, domaĝe, perdis la kutiman aper-ritmon pro troa ŝarĝo de la presejo. Por solvi tiun ne-tolereblan aferon, ni dume ŝanĝis la uzitan presteknikon, kaj espereble tiamaniere nia revuo reakiras la bonan ordon de la aperdatoj. Ni petas tion kompleze akcepti, kaj la redakcio de HV jam nun dankas pro la toleremo al nia tuta legantaro.

Maria Grochowska, PL, Bialystok: la supraj servas responde ankaŭ al via letero. Via pasio solvi krucenigmojn, jam plurfoje premiitaj ankaŭ de nia revuo, ne devas halti pro eventuala malfruiĝo en alveno de HV. Ni zorge plenumas la lotumadon tiel, ke ankaŭ la „malfrue" alvenintaj solvoj partoprenas, ja ĝuste la bedaŭrinda malfrua presado „ebligis", ke ni enŝovu sur la paĝon de la rubriko same malfrue la nomojn de la gajnintoj. Vi havu ankaŭ plu tiurilate sukcesojn kaj plezurojn!

Charles N., Francio: Vian afablan inviton, konsideri la rekomendon de la SAT-Kongreso en Lectoure, ni akceptis despli bonvole, ĉar antaŭ la alveno de via letero ni jam faris tion. Ni prenas serioze la aferon de nia lingvo, kaj per ĉia zorgo nia redakcio intencis kaj intencas *gardi* la bone kompreneblan lingvon en HV. Same, kiel rekomendis la kongreso en Lectoure, ni klopodas bremsi utiligadon de neologismoj superfluaj, kaj forte atendas tion de niaj aŭtoroj. Oni povis rimarki en HV ankaŭ tion, ke foje, se jam ial ŝajnas necese uzi tiajn, aŭ ili troviĝas en – de redaktoro ne modifeble – poemo, ni klarigas tiujn, per gloso okaze jam en la teksto. Ni denove emfazas, ke ni konsideras kiel *vortara bazo* la Plenan Vortaron sen la Suplemento.

KORESPONDI DEZIRAS

Elmar *Ratassepp* (45) juristo, pĉt. Kol. bk. pm. kalendarojn, Estonio, *Valga*, SU–202 500, Komsomoli 3–1. – Ela *Milska* (30) oficistino, ktm. pri artoj, literaturo, SU–314 004 *Poltava*, Poltavskaja 77/33. – Anne *Jungenson* (31) kun e-istino perletere, Estonio, *Tallinn*, SU–200 006, Kuldnova 7–42. – Magdalena *Szymauszka* sociologo, kun mezaĝaj geesp-oj pĉt. PL–00–227 *Warszava* ul. Freta lm3. – Anoj de E-rondo (18–27 j.) en urbo Krásnik pri geografio, turismo, fotografado, muziko, sporto. Skribu al prezidanto Jozef *Maksymiuk*, PTHW, PL–23–210, *Krásnik*, ul. Urzedowska 1. – Maria *Czopek* (23)ktm, pri literaturo, muziko, rec. gastigado, E-e kaj itallingve, PL–30–900 *Kraków*, Novy Prokocim, str. Teligi 20/57. – T. S. *Blahinoj* (23) pri medicinaj novaĵoj, belarto, estradmuziko, E-aĵoj/libroj, SU–153 478 *Ivanovo* str. Sadovaja d. 36–465. – Gerson *Sotano* (4) pĉt. BR–200 000 *Rio de Janeiro* R. do Batete 247/1104. – Luciano *Bonafé* (32) pĉt. amikece, I–40 129, *Bologna*, via P. Tibaldi 19. – Jean *Moreau* (47) pĉt. turismo, F–35 150, *Tanzé*, Champ Saint Pére. – Arne *Bengtsson*, pĉt. kun gejunuloj, S–43 131 *Mölndal*, Åbybergsgatan 32. – Vera *Abram* pĉt, kun junuloj, YU–6100 *Ljubljana*, Celovska 144. – Irene *Matulewitsch* studentino, BRD–5812 *Waltershausen*, Ziegenbergstr. 29. – Evgenia *Lvovna* instruistino mezaĝa en Uzbekistano, SU–700 107 *Taŝkento*, Skolnik str. Nurhon 1, domo 6. – Aleksandr *Mirosnicenko* (28) maŝinisto, SU–700 157 *Taŝkento*, Cilanzar 24, domo 41–34. – Rozumbaj *Hasanov* (20) studento, *Taŝkento*, abonkesto 140. – Fart *Fazilov* (26) gruisto, SU–700 041 *Taŝkento*, str. Abidovoj 314–97. – Jesuo Pérez *Caballero*, Hispanio, Canarias, *Gran Canaria*, Ap. 39. Arucas. – F-ino Eszperantysta *Stankiewicz*, PL–85–804 *Bydgoszcz*, ul. Noakowskiego 3/2b. – Thomas *Dittrich* (17) pri matem. kun junulino. DDR–923 *Brand* Zugspitze 8. – Lajos *Nagy*, (20) pri muziko, kemio, *Kaposvár*, Szalma István u. 6. H – 7400 – Werner *Ittis*, Auenstr. 60. SUHL DDR 60. 35/inĝeniero, pri klasika muziko, diskoj, fotografado, vojaĝoj.

El Japanio korespondantojn prezentas al vi Japana E-o Instituto, Waseda Mati 12–3, Sinzyuku-Ku, *Tokio 162*. Skribu perletere vian aĝon, sekson, profesion, hobion, laŭeble kun foto. – Kun gelernantoj pri bk, pm, ktp, multaj kursanoj el ĉiaj lernejoj. S-ro *Kornators* Naumo (20) kursgvidanto, SU-Latvio, 228730, *Alukse*, Omskas 16–2. – Instruisto Avo *Suurmets*, pri Eo, edukado, instruado ktp, SU–202615, *Värska*, Estonio, – S-ro Ilmar *Palias* serioza filatelisto, i.ŝ. ktm. SU–200 016 *Tallinn*, Liiva 15. – Grupo de geologoj dez. kontaktojn kun gekolegoj ktm. Nikolaj *Borisov*, SU–659773, *Tongur*, GMS Kara-Tjurek, Gorno-Altajskij A.O. – Tallinna E-Klubo, 80 membroj div. aĝaj ktm, sekr. Johannes *Palu*, SU–200 016, *Tallinn*, poste-restante. – Grupo da gestudentoj el Altaja Ŝtata Universitato ktm, pĉt, precipe junulara vivo, klerigo, sociaj kutimoj, ankaŭ vizitocele. *Ebel* Vladimir, SU–656099 *Barnaul–99*, ab.k. 83. – Kuracisto d-ro Milko *Atanasov* (32) ktm, pri literaturo, poezio, filmarto, skulptarto, sporto. BG–9700, *Ŝumen*, str. Sofia 27. – S-ro *Omelĉenko* Aleksej (25) ŝaktisto, SU–340080 *Doneck*, ul Jasnogorskaja N 252, ktm, pĉt., kol. insignojn, pri modernaj aŭtoj kaj aviadiloj. –

Pola instruistino kun mezaĝaj geesperantistoj pri E-movado, E-instruado, turismo, kol. bk, pm, amike: Halina *Ziotkowska*, PL–02–112 *Warszawa*, str. Nowickiego 3/20. – Mgr. Józef *Bednarski* (57) pri seriozaj ideoj, kol. pm, ekkoni homojn kaj renkontiĝi deziras, PL–87–100 *Torun*, ul. Krasickiego 12m6. – Kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj kontaktiĝu kun Goar *Engeländer*, D–4796 *Salzkotten*, Thomasweg 3, GFR. – Kol. ekslibrisojn, pri-marajn bk, Erich *Aavik* (46) ĉefmajstro en fiŝkonservfabriko, SU–200013, Estonio, *Tallinn* Juurdevei 10–2. – Atendas leterojn pĉt. novaj e-istoj (19–45) de rondo; sekretariino Maria *Balaban*, PL–73–110 *Stargard Szczeczinski* Skrytka Pocztowa 148. – Kun hungaroj precipe, Stefna *Ŝumkova*, BG–5300 *Gabrovo*, Ravna gora 22. – F-ino Zdravka *Dobreva*, (33) veterinaro, laboranta en scienca biblioteko, pĉt, ĉefe turismo, lingvoj, ankaŭ france, angle, germane, BG–1000 *Sofio*, str. Boris I. 140. – F-ino Lilija *Zlatanova* (16) gimnaziano, kun hungaroj, bk, libroj, muziko, BG–2500 *Kjustendil* str. Klincovska 29. – Waldemar *Kieca* (19) studento, int. moderna muziko, sporto, filmoj, aŭtorfotoj, PL–42–450 *Lazy*, ul. Brzezowa 14. – Henryk *Swierzyna* ktm, interŝanĝi pm, PL–50–060 *Wroclaw*, Plac Solny 4m2. – János *Czigány* (28) laboristo, pri sporto, teniso, badmintono, keglo, lingvoj, veturo, ktm, intencas partopreni TEJOkaj UK-jn en Lucerno, Stokholmo k.a., *Mosonmagyaróvár*, Kandó K. u. 52., H–9200.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H–1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,- - al eksterlando por unu jaro 78,- forintoj * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,—Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – 79-7020 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Dum ekskurso,
ĉe sporto

en teo,
en limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025, Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért